

EL POPOLA 中國報 道

ĈINIO




10

1995

ISSN 0032-4361

- KUNLABORO INTER ĈINIO KAJ UN
- ĈU ĈINOJ POVOS VIVTENI SIN?
- PATRO DE ĈINA MODERNA PENTRARTO



Stalaktitoj

Foto de HAN HONG

INTER NI

● Okaze de la 45-a datreveno de la fondiĝo de "El Popola Ĉinio", ni ricevis gra-

tulajn leterojn de la Universala Esperanto-Asocio, "Heroldo de Esperanto" kaj de legantoj, perantoj kaj Esperanto-organizaĵoj el Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio,

Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Japanio, Jugoslavio, Koreio, Kroatio, Litovio, Nederlando, Nov-Zelando, Pollando, Rumanio, Slovakio, Ukrainio, Usono kaj Vjetnamio.

Ni kore dankas ĉiujn sendintojn pro iliaj varmaj gratuloj kaj kuraĝigaj vortoj kaj daŭre klopodas por igi nian revuon vaste legebla.

● Memore al la 50-a datreveno de la fondiĝo de UN, ni publikigis en ĉi numero artikolon titolitan "Kunlaboro inter Ĉinio kaj UN". Post la Dua Mondmilito UN ne nur ludis gravan rolon en starigo de nova ordo de la mondo kaj defendo de la monda paco, sed ankaŭ faris grandan kontribuon al la ekonomia disvolviĝo kaj socia progreso, precipe ekonomie kaj teknike subtenis la evoluantajn landojn kaj kunlaboris kun ili. Tio multe helpis ilin rapide disvolvi sian ekonomion kaj sin liberigi de malriĉeco.

En ĉi numero ni rekomendas al vi alian artikolon "Ĉu ĉinoj povas sin vivteni?". Hodiaŭ en la mondo iuj parolas pri la tendenco de kreskado de la ĉina loĝantaro kaj reduktiĝo de agroj en Ĉinio. La artikolo montras la severan situacion, analizas la kialon, prezentas la rimedojn aplikotajn kaj aplikotajn de la ĉina registaro. Ni esperas, ke tiu artikolo povos helpi niajn legantojn koni la fakton.


La Red.

ENHAVO

- 2 *INTER NI*
 4 Kunlaboro inter Ĉinio kaj UN
 7 *ĈINAJ E-ISTOJ:*
 E-filatelisto Song Shengtan
 10 *ORIGINALE VERKITAJ:*
 La deveno de pano (Popolrakonto el Volapuklando)
 12 Esperanto — paco — solidaro
 14 *ESP-NOVAĴOJ*
 15 Patro de ĉina moderna pentrarto
 20 *REORDIGO DE HUIIHE-RIVERO:*
 Huiihe-rivero en kontraŭpoluado
 24 Ĉu ĉinoj povos vivteni sin?
 26 *FAMAJ URBOJ:*
 Handan, urbo de antikva kulturo
 28 *POR KOMENCANTOJ:*
 Amo
 29 *BELECO DE ĈINIO:*
 Gustoplena novjara bildo de Mianzhu
 32 Hebei malfermis sian pordon
 34 En la momento de hiso de ĉina nacia flago
 36 *FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:*
 Voĉo por malpermeso de fumado
 38 Vivo de semokulturisto
 40 "Rekonstruo" de homoj
 42 *MULTNACIA ĈINIO:*
 Originalaj lingvoj de ĉinaj nacimalplimulto
 44 Nova industria urbo Xiangfan
 46 *KURANTAJ AFEROJ*
 48 *POR VIA SANO:*
 Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VII)
 49 *SUR NIA LIBROBRETO:*
 Pri la historio de la ĉina ceramiko
 50 *GALERIO:*
 Pentraĵo "Aŭskultado de Muzikoludo"
SUR LA KOVRILO:
 Dancistino Foto de **Da Wei**
 2 Stalaktitoj
SUR LA DORSKOVRILO:
 Galopo (Ĉinstila pentraĵo)

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO

1. Yanshi (p. 38)
2. Mianzhu-gubernio (p. 29)
3. Hebei-provinco (p. 32)
4. Xiangfan (p.44)
5. Yixing (p. 15)



HAN LIN:

KUNLABORO INTER ĈINIO KAJ UN

LA 24-a de oktobro 1995 estas la 50-a datreveno de la fondiĝo de UN. En la pasintaj 50 jaroj, kiel grava organo por starigi novan ordon de la mondo kaj defendi la mondpacon post la Dua Mondmilito, UN ludis pli kaj pli gravan rolon internacie en politiko, ekonomio, kulturo kaj kontakto.

Ĉinio estas unu el la fondintoj de UN kaj ankaŭ konstanta membro de ĝia Konsilio de Sekureco. Ĉinio iris zigzagan vojon antaŭ ol kunlabori ĉiuflanke kun UN.

Oktobre de 1971 la 26-a Ĝenerala Asembleo de UN aprobis rezolucion kaj deklaris restarigitajn ĉiujn leĝajn rajtojn de la Ĉina Popola Respubliko en UN. Post tio, Ĉinio aliĝis al ĉiuj departementoj kaj internaciaj organizoj de UN kaj faris ĉion eblan por plifortigisian kunlaboron kun UN kaj diversaj landoj en ĉiuj flankoj.

Kiel konstanta membro de la Konsilio de Sekureco de UN, Ĉinio alte taksas siajn respondecojn kaj devojn kaj faras kontribuojn por defendi la mondpacon, batali kontraŭ la politika hegemonio kaj solvi internaciajn konfliktojn.

En la sfero de socio kaj ekonomio Ĉinio aktive partoprenas en

ĉiuj aktivadoj de UN. Ĝis junio de 1989 Ĉinio ricevis de financaj establoj de UN avantaĝan krediton de proksimume 8.6 miliardoj da usonaj dolaroj kaj de aliaj establoj de UN pli ol 800 milionojn da usonaj dolaroj kiel senrekompencan teknikan helpon. Ĉinio siaflanke donis ekonomian helpon al triamondaj landoj pere de UN, kio akcelis interkompreniĝon kaj kunlaboron inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Limigite de la spacoj, tiu ĉi artikolo temas ekskluzive pri la kunlaboro inter Ĉinio kaj la Grena kaj Agrikultura Organizo, Monda San-Organizo kaj Disvolva Programo de UN kaj Unesko.

GRANDAJ SUKCESOJ EN LA KAMPO DE GRENO KAJ AGRIKULTURO

Oktobre de 1993 la Grena kaj Agrikultura Organizo de UN donis premion al s-ino Niu Yuqin de Shaanxi, Ĉinio, honore al ŝia kontribuo en verdigado.

De 1985 Niu Yuqin kaj ŝiaj familianoj verdigis 667 hektarojn da sabla tero kaj gvidis la vilaĝanojn arbarizi 7 000 hektarojn. Dank' al tio, la jara produktokvanto de greno 4-oble pli grandigis ol tiu en la pasinteco.

La premio montris la atenton

de ambaŭ flankoj pri mediprotekto kaj disvolviĝo de grena produktado kaj spegulis ankaŭ la bonan kunlaboron inter Ĉinio kaj la organizo dum longa tempo.

Ĉinio estas konsiliano de la organizo kaj funkciis kiel vicprezidanto de la Ĝenerala Konferenco kaj membro de ĝia Ĝenerala Komitato. En 1982 la organizo starigis agentejon en Ĉinio kaj en 1987 Ĉinio komencis ricevi teknikan helpon donitan de ĝi. Ĝis nun la organizo donis al Ĉinio 29 milionojn da usonaj dolaroj kiel senrekompencan teknikan helpon kaj pli ol 90 agrikulturaj projektoj estis finplenumitaj. Per sia tekniko la organizo efektivigis la helpon de la Banko de Mondo kaj la Internacia Fonduso por Agrikultura Disvolviĝo al Ĉinio.

De la 70-aj jaroj la Grena kaj Agrikultura Organizo de UN aktive helpas diversajn landojn en mediprotekto kaj grena produktado. La projekto "Plibonigo kaj Utiligo de Tero kaj Biofontoj de la Leŭsa Altebenaĵo en Nordokcidenta Ĉinio" estas plenumata de la Grena kaj Agrikultura Organizo kaj Disvolva Programo de UN. En la regiono, kie plenumiĝas la projekto, pli ol duono de la tero estas kovrita de vegetaĵoj, la tera erozio estas certgrade bridita kaj la grena produktokvanto pliiĝis je 130%. Tio havigis multe da teknikoj kaj spertoj al Ĉinio en ĝia reformado de la Leŭsa Altebenaĵo.

La Grena kaj Agrikultura Organizo de UN sukcese popularigis en Ĉinio la teknikon amoniizi pajlojn de agrikulturaj plantoj kun ureo kiel ĉefa amoni-fonto. La amoniizitaj pajloj estas nutroriĉaj kaj servas kiel ĉefa furaĝo de bovo, ŝafo kaj aliaj remaĉuloj. Unue la projekto plenumiĝis en la provincoj Henan kaj Hebei kaj poste populariĝis en pluraj provincoj de centra Ĉinio. En 1992 pli ol du milionoj da kamparanaj familioj uzis la teknikon, kaj rezulte de tio la bovaĵa produktokvanto kreskis je 20% ĉiujare. La tekniko ŝparigas grandan kvanton da greno kaj reduktas poluadon de medio kaŭzi-

tan de bruligo de la pajloj.

La sukcesoj kaj spertoj akiritaj en la agrikultura disvolviĝo kaj reformado de la ĉina kamparo estas alte taksataj de oficistoj de UN. Helpate de UN, Ĉinio finis 127 agrikulturajn projektojn kaj pli ol 70 konstruaĵojn por irigacio, grenkaj ole-prilaboro kaj fabrikado de agrikulturaj maŝinoj en 47 disvolvigantaj landoj kaj helpis al ili ekspluati virgan teron kaj kulturajn rizon kaj sukerkanon.

POR DISVOLVI EDUKADON, SCIENCOJN KAJ KULTURON

En 1994 la 18-a Sesio de la Komitato de Mondaj Heredaĵoj de Unesko enlistigis en "Katalogon de Mondaj Heredaĵoj" la kulturajn heredaĵojn de Ĉinio, kiaj Potalpalaco en Tibeto, la Someruma Montvilao kaj ĝiaj proksimaj temploj en Chengde de Hebeiprovinco, la Konfucea Templo, Konfucea Domo kaj Tombejo de Konfuceaj Familianoj en Qufu de Shandong-provinco kaj la antikva konstruaĵaro en Wudang-montaro de Hubeiprovinco. De post 1985, 14 kulturaj kaj naturaj heredaĵoj de Ĉinio estis enlistigitaj en "Katalogon de Mondaj Heredaĵoj". Tio ludas gravan rolon por pligrandigi la famecon kaj konservi historiajn restaĵojn kaj vidindaĵojn de Ĉinio.

La supre dirita estas malgranda parto de la kunlaboro inter Ĉinio kaj Unesko. De 1971 Ĉinio vaste kaj efike kunlaboras kun ĝi en edukado, kulturo kaj sciencoj.

Marte de 1993, subtenate de Unesko, Ĉinio okazigis kunvenon pri tutpopola edukado kaj en la kunveno estis aprobita "La programo pri agadoj de tutpopola edukado en Ĉinio".

Per mono donita de Unesko kaj aliaj internaciaj organizoj Ĉinio ĉefe faras strategian laboron likvidi la analfabetecon de junuloj kaj plenkreskuloj, eduki kaj trejni la plenaĝulojn en la kamparo kaj daŭre eduki la antaŭajn. Ĉio ĉi liberigis milionojn da ĉinoj de analfabetecon.

En 1986 oni komencis efektiviĝi en Gansuprovinco "Komunan renovigan planon ĉioamplekse altigi la edukatan nivelon de elementlernejoj" aranĝitan de la Azia kaj Pacifika Fako de Unesko. Laŭ statistiko pri 100 eksperimentaj elementaj lernejoj de la provinco, en 1986-1992 la nombro de lernantoj kreskis de 95.6% al 99.8% kaj tiu de diplomitoj de 93.1% al 97.6%. La procento de tiuj, kiuj ricevis antaŭlernejaran edukadon, kreskis de 56% al 97.2%. Unesko estas preta financi efektiviĝadon de la plano en la provincoj Hebei, Henan, Guizhou, Yunnan kaj Qinghai de Ĉinio.

Tiel frue kiel en la 70-aj jaroj Ĉinio partoprenis en sciencaj aktivadoj de Unesko pri la plano de homo kaj biosfero kaj plano de internacia hidrologio. Nun Dinghujmonto, Shennongjia-regiono, Wolong-naturparko de pandoj kaj aliaj sep regionoj de Ĉinio estas rigardataj kiel rezervejoj de monda biosfero; la unua ĉina esplora kaj trejna centro pri sablo de internacia rivero trejnigas jam de dek jaroj hidrologojn por disvolvigantaj landoj en la azia kaj pacifika regiono.

Septembre de 1995, la Kvara Monda Virina Konferenco de UN okazis en Pekino. Por sukcesigi la konferencon Unesko aranĝis serion da aktivadoj, kiujn aktive subtenis la Ĉina Ŝtata Komitato.

La kunlaboro inter Ĉinio kaj UN en la kampo de naturaj kaj sociaj sciencoj kaj en la kultura interŝanĝo ludas gravan rolon por akceli la disvolviĝon de la ĉinaj sciencaj aferoj kaj pliiĝi la famecon de la ĉina kulturo en la internacia socio.

POR KE ĈIU ĜUU SANITARAN SERVON



Aŭguste de 1988 ĉina ambasadoro Li Luye prezidis kunvenon de la Konsilio de Sekureco de UN.

En aprilo — junio de 1945 okazis kunveno en San-Francisko. Tiam ĉina delegito Shi Siming kaj brazila delegito kune proponis fondi internacian san-organizon, kion aprobis la kunveno. Tio metis bazon por fondi poste la Mondan San-Organizon.

De 1972 Ĉinio plivastigis kunlaboron kun la Monda San-Organizo kaj por disvolvi la higienan aferon ĝi enkondukis kapitalon, teknikon, talentulojn, informojn kaj instalaĵojn. La kunlaboro koncernas medicinon, politikon kaj leĝdonon de higieno, mediprotekton kaj sanitaron; teknikan esploron kaj medicinan trejnadon; kuracon per okcidenta medicino kaj esploron de la tradicia ĉina medicino. Interalie, la plej grava temo estas tiu pri plifortigo de la servo en higienaj aferoj de virinoj kaj infanoj kaj naskolimigo kadre de la bazaj socitavoloj de Ĉinio, efektiviĝata de la Monda San-Organizo kaj aliaj departementoj de UN unuflanke kaj Ĉinio aliflanke. De septembro 1990 ĝis marto 1991 oni trejnigis entute 120 000 vilaĝajn kuracistojn pri sanprotekto en gravedeco kaj puerpereco, naskolimigo, patrina mamnutrado kaj interhomaj rilatoj.

La statistiko farita fine de 1993 montras, ke en pli ol tri jaroj la mortokvanto de gravedulinoj kaj akuŝintinoj malkreskis de 182.1/100 000 al 152.93/100 000 kaj la mortokvanto de infanetoj de 72.5/1 000 al 54.17/1 000.

Dank' al kunlaboro kun la

Monda San-Organizo, scienc-esploraj kaj medicinaj organizoj de Ĉinio rimarkinde disvolviĝis kaj ekhavis mondnivelajn instalaĵojn kaj fakulojn. Unu el ili estas la Ŝanhaja Instituto de Naskolimigo. Kunlabore kun la Monda San-Organizo en ties Speciala Programo de Esploro, Disvolvo kaj Esplora Trejno en Homa Reproduktado, ĝi fariĝis bazo de esplorado pri naskolimigo en Ĉinio, kio metis bonan fundamenton por ĝia eniro en la kampon de naska reguligo en la mondo.

Pere de la Monda San-Organizo, Ĉinio siaflanke partoprenas en internacia kunlaboro kaj kontribuas por disvolvi la aferon de medicino kaj higieno kaj efektiviĝi la universalan strategian celon "Ĉiu ĝuu sanitaran servon en 2000". Nun 64 higien-esploraj organizoj de Ĉinio estas taskitaj plenumi scienc-esplorajn programojn kunlabore kun aliaj landoj kaj kulturaj fakulojn precipe por la tria mondo. 120 ĉinaj fakuloj estas invitetaj kiel membroj de la konsilantaro de la Monda San-Organizo. 19 ĉinaj fakuloj laboras kiel oficistoj de la organizo kaj iuj ĉinaj specialistoj servas kiel ĝiaj provizoraj konsilantoj, kiuj faras teknikan konsultiĝon, programan peticion kaj lekiadon al koncernaj personoj de triamondaj landoj.

KARAKTERIZAJĜOJ DE KUNLABORO

La 29-an de junio 1979 la ĉina registaro kaj la Disvolva Programo de UN subskribis la interkonsenton pri kunlaboro kaj interŝanĝis la dokumentojn, kio markis la komencon de la ĉiuflanka kunlaboro inter ili. Septembre de la sama jaro, la Disvolva Programo de UN starigis agentejon en Pekino. En la pasintaj 15 jaroj ĝi efektiviĝis en Ĉinio 500 kunlaborajn projektojn rilatajn al agrikulturo, forstokulturo, brutobredado, fiŝkaptado, radioelsendo, televido kaj industrioj maŝina, elektrona, kemia, energia, metalurgia, min-ekspluata kaj tekstila. La kunlaboron karakterizas la jenaj.

La kunlaboro ne plu katenis sin de teknika helpo sed nun ĝi koncernas ankaŭ la mola-sciencajn fruktojn, kiuj adaptiĝas al la reformado de la ekonomia sistemo de Ĉinio kaj koncernas la ŝlosilan punkton de la reformado. Ekz., la projekto "Reformado de ĉinaj impostoj", praktikata kun monhelpo de la Disvolva Programo de UN, ludas gravan rolon por pli frue publikigi la novan sistemon de ĉinaj impostoj; la projekto "Leĝdono favore al ekonomia reformado" havas bonan influon sur ellaboradon de 22 gravaj ekonomiaj leĝoj kaj reguloj de Ĉinio. Kaj krome, la Disvolva Programo ankaŭ invitos alilandajn fakulojn en esploro pri altigo de la entreprena efiko kun respondeculoj de ĉinaj entreprenoj kaj rilataj fakoj.

La du flankoj kunlaboras surbaze de la principo de kombino kun la disvolva strategio kaj plej favorataj kampoj de Ĉinio, por energie akceli la disvolviĝon de la industrioj energia, telekomunika, trafika, mediprotekta kaj fundamenta. La projektoj "Utiligo de karba cindro kaj la disvolviĝo de esplorado pri ĝi en la Ŝanhaja Akademio de Arkitekturo" estas praktikata kun helpo de la Disvolva Programo de UN. Rezulte de tio, la kvanto de la utiligita karba cindro en Ŝanhajo atingis 85% en 1993 kaj tiu de Ĉinio kreskis de 16% al 32% en 1992. Per tio Ĉinio okupas avangardan lokon en la mondo.


Ĉinaj kaj alilandaj fakuloj estas tre atentataj. En la pasintaj 15 jaroj Ĉinio sendis 5 200 teknikistojn kaj administrantojn trejniĝi aŭ fari esploradojn en aliaj landoj kaj invitis 7 500 alilandajn fakulojn kaj 70 volontulojn de UN lekciigi aŭ labori en Ĉin-

io. Pli ol 10 000 ĉinoj lernis en kursoj.

Ekspluati malriĉajn regionojn estas grava projekto subtenata de la Disvolva Programo de UN. La helpo celas doni ekzemplon pri ekspluatado de malriĉa regiono, disvolvi edukadon, higienan laboron kaj agrikulturan produktadon en la malriĉaj regionoj kaj liberigi loĝantojn el malriĉeco. La tekniko pri bonrasigo de kuniklo kaj viandkoko kaj avangarda administrado de la Centro de Brutorasa Pliibonigo de Mengyin-gubernio, Shandong-provinco, estas plivestigataj en la provinco kaj aliaj lokoj de Ĉinio. La dua projekto, praktikata de la Disvolva Programo de UN en la periodo de 1986-1990, kaj la nun praktikata tria projekto celas plialtigi la vivnivelon de la popolanoj, precipe tiun de la landlimaj regionoj.

Alta takso de la teknika kunlaboro kun la disvolviĝantaj landoj estas komuna kono de Ĉinio kaj la Disvolva Programo de UN. De post 1981 ili kune starigis en Ĉinio esplorajn kaj trejnajn centron de la azia kaj pacifika regiono pri metano, hidroelektro, sanitara servo, silkraŭpa bredado, fiŝbredado, sinteza disvolviĝo en la kamparo kaj reformado de la ekonomia sistemo. Ĝis la fino de 1993 okazis sume 133 kursoj kaj simpozioj, en kiuj oni kulturis 459 fakulojn por 88 landoj kaj regionoj. Tio antaŭenpuŝis la suda-sudan kunlaboron kaj interregionan kunlaboron. ■

Membro de la Grena kaj Agrikultura Organizo de UN esploras en ĉina vilaĝo.



E-filatelisto Song Shengtan

Teksto de WANG HANPING

Fotoj de LI CHUNGENG

MULTAJ esperantistoj ŝatas filatelon, precipe amas kolekti poŝtmarkojn pri Esperanto, sed malmultaj atingis brilajn sukcesojn ĉi-riilate. Inter ili troviĝas s-ro Song Shengtan, ordinara mezlerneja instruisto.

Jam en sia knabeco s-ro Song komencis kolekti poŝtmarkojn. Tiam li kolektis poŝtmarkojn speciale de Britio. Li kontaktiĝis kun Esperanto kaj komencis mem lerni ĝin en 1958, kiam li lernis en la ĉinlingva fakultato de la Nankina Universitato. Poste li kolektis ankaŭ kelkajn Esperantajn poŝtmarkojn. Komence li rigardis ilin kiel signon de sia Esperanta lernado. Poste kun profundigo de la lernado, li pli kaj pli konis Esperanton kaj estis forte tuŝita de la idealo, kredo kaj sindonemo de D-ro Zamenhof. Li ne nur diligente lernis Esperanton, sed ankaŭ sisteme kolektis Esperantajn poŝtmarkojn. Ĝis la komenco de 1966 li havigis al si plejparton da Esperantaj poŝtmarkoj, inter kiuj estis rara Esperanta poŝtmarko, emisiita de Bavario en 1911, sed bedaŭrinde perdiĝis ĉiuj liaj Esperantaj poŝtmarkoj kaj eldonaĵoj dum la ĉina kultura revolucio. Li devigite ĉesigis filateladon kaj lernadon de Esperanto.

En 1977 li rekomencis filateladon kaj lernadon de Esperanto, kuraĝigite de veterana esperantisto Tikos, kiu donis al li taskon traduki la libron de Gaston Waringhien "Lingvo kaj Vivo". Ĉiutage li tradukis de la 22-a ĝis la 2-a de la sekvanta mateno. 4 monatojn poste li finis la tutan libron. S-ro I.

Paulsson, prezidanto de la E-Ligo Filatelista-Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj, multe helpis lin. Dank' al li s-ro Song retrovis sian svedan esperantistan amikon, kun kiu li korespondis antaŭ 15 jaroj. Aliginte al la E-Ligo Filatelista-Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj, li konigis al alilandaj Esperantaj-kolektantoj diversajn ĉinajn filatelaĵojn kaj havigis al si Esperantajn poŝtmarkojn sub ilia helpo. Krome, li kolektis ankaŭ multajn Esperantajn kovertetojn, poŝtkartojn, memoriĝajn poŝtstampojn kaj Esperantajn glumarkojn. Inter liaj Esperantaj filatelaĵoj iuj estas tre raraj.

Junie de 1983 s-ro Song partoprenis en la Unua Ekspozicio de Filatelaĵoj de Jiangsu-provinco, kun sia filatela albumo "Artefarita Lingvo — Esperanto", kiu ricevis altan taksadon de vizitantoj. Poste la Jiangsu-a Filatela Asocio sendis lian albumon al la Ĉina Ekspozicio de Filatelaĵoj okazinta en tiu jaro. La albumo estis premiita per arĝenta medalo. Poste li gajnis kupran medalon de la Monda Ekspozicio de Filatelaĵoj en Svedio en 1986, orumitan medalon de la Ĉina Ekspozicio de Filatelaĵoj en 1989, kupran medalon de la Monda Ekspozicio de Filatelaĵoj en Brazilo en 1993 kaj arĝentumitan medalon de la 6-a Azia Ekspozicio de Filatelaĵoj en Indonezio en 1993.

En Esperanta filatelado de s-ro Song speguliĝas la penado de liaj lernado kaj propagando de Esperanto. Parolante pri sia sukceso, li ege kontentas pri tio, ke Esperanta filatelado okupis lokon en la filatela kampo kaj samtempe disvastigis

Esperanton.

S-ro Song famiĝis en la filatela rondo kaj Esperantujo. Li estas komitatano de la Ĉina E-Ligo, ĝenerala sekretario de la Jiangsu-a E-Asocio, delegito de UEA, membro de la Konsilio de la Jiangsu-a Filatela Asocio, ĉefredaktoro de la gazeto "Jiangsu-a Filatelo" kaj provinc-nivela juĝanto por ekspozicioj de filatelaĵoj. Pro liaj rimarkindaj sukcesoj kaj elstaraj gvidado kaj organizado de filatelaj aktivadoj oni plurfoje elektis lin kiel avangardan filateliston de Ĉinio, Jiangsu-provinco kaj Nankino. En 1987 la Ĉina E-Eldonejo eldonis lian "Katalogon de Esperantaj Poŝtmarkoj", kiu estis baldaŭ elĉerpita. Nun li preparas artikolojn por "Filatela Enciklopedio".

S-ro Song laboras kiel ĉinlingva instruisto en la 43-a Mezlernejo de Nankino. Ĉiutage li ellitiĝas je la 5-a kaj duono. Post matenmanĝo li veturas per aŭtobuso kaj piediras duonhoron al la lernejo. Li tagmanĝas en la lernejo kaj hejmen reiras je la 16-a kaj duono. Ĉi-jare li devas emeritiĝi, sed li ne povas, ĉar la lernejo lin bezonas.

S-ro Song vivas en feliĉa kaj harmonia familio. Lia edzino estas emerito de la Nankina Fabriko de Elektronaj Tuboj. Ili havas filon kaj filinon, kiuj havas profesion. Krom Esperanto kaj filatelo, li amas ankaŭ belarton kaj klasikan muzikon.


Tre okupita, s-ro Song vivas signifoplene. Li diris, ke li, emeritiĝinte, ne restos senfara, ĉar li devas fari multajn aferojn por la Jiangsu-a Filatela Asocio kaj la Jiangsu-a E-Asocio. ■



S-ro Song Shengtan kaj liaj lernantoj


S-ro Song Shengtan kaj aliaj filatelistoj





S-ro Song Shengtan

Esperantaj filatelajoj kolektitaj de s-ro Song Shengtan



La deveno de pano

(Popolrakonto el Volapuklando)

de BERNARD GOLDEN (Hungario)

ANTAŬ tre, tre longa tempo, pri kiu ne povas memori eĉ la plej maljuna homo inter ni, familioj vivis tre izolite unuj de aliaj, kaj apartigis ilin vastegaj nelogataj teritorioj. Tie ili vivis per ĉasado de sovaĝbestoj kaj kolektado de vegetalaj nutraĵoj troveblaj en la natura ĉirkaŭaĵo. Unu el tiuj familioj konstruis sian pajle tegmentitan terkabanon apud la rivereto Temamasonalo (Kot-rivero) ĉe la piedo de Pinamono (Nigra Monto), kies pinto estis daŭre vualita de nebulo. Loĝis kune ses personoj: Fodimako (Falko), lia edzino Kusabolo (Flava Floro), du plenkreskaj filoj — la pli aĝa Vatokamo (Lupo) kaj ties juna frato Delokipe (Vulpo — la patrino de Fodimako, Avinjo Vabozako (Abelo), kaj la dekjara filino de Fodimako kaj Kusabolo, Solevuno (Sunradio).

Dum la tri inaj membroj de la familio ĉiutage pasigis plurajn horojn travagante veprejojn kaj la arbaron en la proksimeco de la kabano, la viroj serĉis ĉasaĵon en pli foraj partoj de la arbaro sur la kruta montoflanko. Tiel la familio vivtenis sin de tago al tago, ĉiam ĉe la rando de malsato pro neatenditaj periodoj de sekeco, kiuj okazigis malpliigon de la kvanto da kreskajoj kaj, sekve, formigradon de la sovaĝbestoj. Tiaj estis la cirkonstancoj dum la pasintaj du-tri monatoj, do Panjo Kusabolo urĝis siajn edzon kaj filojn entrepreni ĉasiron trans la pintajn nubojn de Pinamono por serĉi ĉasaĵon en la herboriĉa Valameno (Verda Valo).

Post tuttaga marŝado, Fodimako, Vatokamo kaj Delokipe trafis la celitan Valon Valameno, ĝuste en la momento de la sunsubiro. Antaŭ ili etendiĝis Mikonilo (Fiŝ-lago), okupanta grandan parton de la verda valo. Ĉe ĝia proksima bordo staris tri diversgrandaj kabanoj; ili estis la loĝloko de Panavelo (Blanka Haro) kaj lia multenombra familio. La transmontoj direktis siajn paŝojn al la plej granda kabano, el kiu venis renkonte al ili kaduka patriarko. Post reciproka sinprezentado, la oldulo eksciis, ke la du filoj de Fodimako estas fraŭloj; sekve, li ne bezonis multe da cerbumado por kovi planon plibonigi la ekonomian situacion de sia granda familio, liberigante ĝin de du superfluaĵ filinoj, kies kvar manoj neniam produktas sufiĉon por plenigi iliajn du buŝegojn.

La blankharulo, do, afable invitis la tri fremdulojn vespermanĝi kaj ankaŭ tranokti ĉe ili, antaŭ ol komenci la longan vojaĝon reen al la hejmkabano. Paĉjo Fodimako kun plezuro akceptis tiun proponon, kaj la olda Panavelo tuj komencis efektiviĝi sian planon svati al la filoj de Fodimako la du fratinojn Babekome (Ostsako) kaj Tolopuso (Dikkorpo). Laŭte kaj laŭde priskribante ilian mastrumadan kapablon, li emfazis ankaŭ, ke ili estas speciale lertaj en la preparado de tre bongusta drinkaĵo, havanta en la loka dialekto la nomon *biro*, kiu vigligas kaj feliĉigas homojn. La tri novvenintoj, tute elĉerpitaj pro la longa kaj malsukcesa ĉasiro, avidis gustumi tiun

mirindan fluidaĵon.

Panavelo trifoje kunfrapis siajn manojn, kaj tuj alkuris la du filinojn kun granda kruĉo kaj pokaloj. Tiujn ĉi ili ĝisrande plenigis kaj proponis al la vizitantoj. Dum la viroj englutis la bieron, la tre gastama Panavelo sciigis, ke unu pokalo da biero estas nenio, du ne sufiĉas, tri apenaŭ estas tro, do oni ne devas halti ĉe la kvara, kaj... Baldaŭ Paĉjo Fodimako kaj liaj filoj ne plu kapablis nombri la pokalojn nek distingi iliajn formojn kaj kolorojn.

Ĝuste tiam la ruza patriarko kaptis la okazon formale prezenti siajn filinojn Babekome kaj Tolopuso, kaj proponi geedziĝon kun Vatokamo kaj Delokipe respektive. Tiu kun la nomo Babekome estis altstatura, magra aro da ostoj, kiujn tegis flava, faltplena, ledeca haŭto. Kontraste kun ŝi, la pli juna fratino Tolopuso estis plumpa dikuleto kun mola, rozkolora karno; ŝian senespriman, pustulplenan vizaĝon kadris amaso da nekombeblaj nigraj hartufoj. Ankaŭ tiuj du drinkis multe da biero, do ili havis nur svagan ideeton pri la celo de la kundrinkado, ĝis la olda families-tro ĉantis kelkajn ceremoniajn formulojn servantajn por edzoliĝi la du fraŭlojn al liaj filinoj. Dum la improvizita nuptofesteno, kiu sekvis, okazis pli da drinkado kaj poste longa dormado.

Kiam la tagmeza suno staris alte sur la ĉielo, venis sobra kompreno de la nova situacio. Fodimako, ankoraŭ ŝanceliĝante, komencis hejmeniri, akompanate de siaj du filoj en posedo de tute ne kutima "ĉasitaĵo". La junaj viroj devis perforte peli siajn novedzinojn, ĉar tiuj ĉi ne volonte akceptis sian subite trafitan sortoŝanĝon. Dum la kvinopo malsupreniris sur la transa flanko de la monto, ekiris el la kabano Panjo Kusabolo, okulstreĉe serĉante la rezultojn de ilia ĉasado. Kiam la viroj pli alproksimiĝis, Kusabolo demandis: "Ĉu tiel malsukcesis via ĉasiro? Mi atendis, ke vi portos unu-du cerbojn. Kial vi revenis kun malple-naj manoj?"

“Ne precize malplenaj,” protestis ŝia edzo. “Rigardu la edzinojn, kiujn niaj filoj trovis en Valo Valameno apud Lago Mikonilo.” La patrino alpaŝis kaj, fikse rigardante la du hidulinojn, eligis orelfendan ŝrikon. “Por kio ili taŭgas? Ĉu oni povas manĝi ilin? Reportu tiujn du ulinojn kaj jetu ilin en Fiŝ-lagon!”

“Atendu, Panjo,” ekparolis Vatokamo. “Ilia patro diris al ni, ke ili estas lertaj mastrumantoj kaj, cetere, ili scias prepari mirindan drinkaĵon, kiun ili nomas *biro*.” Li ordonis al ŝia edzino kaj ŝia fratino ekboligi akvon, por ke ankaŭ Panjo povu gustumi la alkoholaĵon. La patrino atente rigardis, kiel ŝiaj ĵus akiritaj bofilinoj ŝutis en la akvon diversspecajn vegetalajn ingrediencojn, plejparte semojn kaj grajnoj de sovaĝkreskaĵoj, kiujn ili antaŭe pistis sur kava ŝtono. Kiam la dekoktaĵo vikle bolis, ili klarigis al ŝia bopatrino, ke ŝi restu apud la fajrejo iom da tempo, poste forprenu la bolpoton kaj starigu ĝin malkovrita apud la kabano, por ke povu okazi fermentado. Pro laciĝo la du fratinoj eniris la kabanon por dormi, kaj Paĉjo Fodimako kaj liaj filoj faris la samon.

Panjo Kusabolo, havante multe da farendadoj en kaj ĉirkaŭ la kabano, taskis al Avinjo Vabozako la zorgon pri la bolanta miksaĵo en la poto, kaj avertis ŝin ne lasi ĝin sur la fajro tro longe. La maljunulino sidiĝis sur la grundo apud la poto sed, pro la varmo de la suno kaj ankaŭ la fajro, ŝi ne povis teni malfermitaj la okulojn kaj baldaŭ endormiĝis.

Panjo Kusabolo preskaŭ forgesis la dekoktaĵon, kiam atingis ŝian orelon siblanta sono venanta de la direkto de la fajrejo. “Ho ve!” ŝi kriis, rapidante al la fajrejo. “Jam forvaporigis la akvo por la biero.” Ŝi enrigardis la poton, kie sur la fundo sedimentis maldensa kaĉo. Kolerante pro la malŝparo de valoraj ingrediencoj, kiujn ŝi mem kolektis dum ŝvitiga laboro, Kusabolo impete verŝis la surfundiĝintan kaĉon sur la ardantajn ŝtonojn de la fajrejo kaj iris lavi la poton.

La kaĉo sur la varmegaj ŝtonoj, pro eliro de la restanta akvovaporo, komencis malmoliĝi kaj, kiam la virino revenis al la kuirloko, ŝi flaris bonan odoron ŝvebantantan ĉirkaŭ la fajrejo. La kaĉo tegis la ŝtonsurfacojn en la formo de dispeciganta krusto, kaj tiuj fragmentoj, kiuj ne karbiĝis, akiris or-brunan koloron. Pensante, ke ĉio, kio bone odoras, devas ankaŭ bone gusti, Kusabolo ekprenis pecon kaj, mordetante ĝin, trovis, ke ĝi havas kraketantan teksturon kaj agrablan guston. Venis ankaŭ Solevuno, ŝia daŭre malsata filino, kiu, plenŝtopinte sian buŝeton per krustaĵoj, konfirmis, ke ili ja estas manĝindaj.

Post vekiĝo, la du novelzinoj hastis al la fajrejo por kontroli la staton de la bier-dekoktaĵo. Ili konsterniĝis, trovante, ke forvaporigis la akvo, kaj ne povos esti preta drinkaĵo por la viroj. Kiam ankaŭ tiuj ĉi ellitiĝis, ili postulis drinkaĵon kaj manĝaĵon. Panjo Kusabolo klarigis al ili pri la akcidento kaj tuj alportis bovlojn da legomsupo por la vespermanĝo. Anstataŭ biero, ŝi proponis, ke ili gustumu kun la supo kelkajn kraketantajn flanojn, kiujn ŝi ĵus bakis. Pro scivolo ĉiuj provis la novan manĝaĵon kaj konsentis, ke ĝi estas bongusta, do Panjo konvinkiĝis, ke el ĉiu malbono venas ankaŭ bono. Ankaŭ la du verdvalaninoj, kiuj furioziĝis pro la fuŝita biermiksaĵo, mildigis iomete sian koleron. La altstatura edzino plenigis ankoraŭ unu bolpoton per akvo, dum ŝia stumpa fratino pistadis la vegetalajn ingrediencojn. Tuj kiam ekbolis la akvo, Babekome, svingante per la mano longan kirlostangon, minacis Panjon Kusabolo. “For la manojn! Ne tuŝu tiun ĉi bolpoton, ĝis ni diros, ke la dekoktaĵo estas preta.” Tra la densa harmato de ŝia fratino etendiĝis ruĝa lango kaj aŭdiĝis obscena bleko por akcenti la admonon. Post kiam la akvo bolis sufiĉe longe, la bofilinoj forprenis la bolpoton de la fajrejo kaj portis ĝin al sunplena loko antaŭ la kabano.

La sekvan matenon, antaŭ ol iri en la arbaron, Fodimako kaj liaj

filoj, preterpasante la poton, trempis siajn fingrojn en ĝi kaj lekis la fluidaĵon. Ili montris sin kontentaj pri la disvolviĝo de la fermentado. De malantaŭ la kabano gvatis ilin Avinjo Vabozako. Post ilia foriro, pro scivolo ŝi alproksimiĝis al la poto kaj vidis, ke naĝas sur la surfaco de la akvo multaj malgrandaj vezikoj. Ŝovante sian nazon en la poton, la oldulino aŭdis kraketantan siblosusuradon. Same kiel faris la viroj, ankaŭ Avinjo trempis fingron en la biero kaj lekis ĝin. Tre plaĉis al ŝi la gusto, do ŝi plurfoje ripetis la saman agon kaj poste trinketis la bieron el siaj plenaj mankavoj. La alkoholaĵo havis rapidan efikon sur Vabozako, kaj duonhoron poste Panjo Kusabolo stumblis sur la laŭte ronkanta, ebriiĝinta maljunulino. Forgesante la averton, kiun ŝi ricevis de siaj bofilinoj, ankaŭ Panjo Kusabolo komencis gustumi la bieron, kiun ŝi elprenis el la poto per granda ĉerpilo. Post nelonge, ankaŭ ŝi falis en profundan ebrian dormon.

Nepriskribebla estis la kolero de la fiŝlagaj fratinoj, kiam ili konstatis, ke Panjo kaj Avinjo jam forkonsumis grandan kvanton da biero. Por konservi la reston, ili transverŝis ĝin en alian poton kaj ĵetis sur la grundon dikan tavolon da densiĝinta kaĉo. Kiam Panjo Kusabolo vekiĝis, ŝi estis tre malgaja, ĉar la biero estis forportita, kaj restis apude la malplena poto kaj kaĉo en la formo de granda past-bulo. Tiam venis en ŝian kapon la ideo ankaŭ hodiaŭ provi baki flanojn por la vespermanĝo.

La hodiaŭa ĉasiro sukcesis, kaj la viroj alportis paron da leporoj. Dum la vespermanĝa stufaĵo kuiriĝis, Panjo reiris al la loko, kie ŝi lasis la kaĉ-paston, kaj trovis, ke ĝi ne similas al la substanco, kiun ŝi ĵetis sur la fajrej-ŝtonojn la antaŭan tagon. Ĉi-foje, pro la fermentado, la eksteraĵo de la maso jam ŝanĝiĝis; ĝi ŝvelis! Kusabolo formis en siaj manoj multajn buletojn kaj aranĝis ilin sur la varmegaj ŝtonoj de la fajrejo. Post kelkaj

(Daŭrigo sur p. 28)

ANATOLI LONESOV* (Uzbekistano):

Esperanto — paco — solidaro

*Komprenu, homoj de la Tero,
malamikeco — ja malbeno.
Vivu do ĉiam amikece,
senkverele kaj fratece.*

Tiuj ĉi daŭre aktualaj vortoj, kiujn antaŭ 500 jaroj versis alvoke la eminenta uzbeka poeto kaj pensulo Aliŝer Navoi, mote renkontas la vizitantojn de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro.

Ĝi hejmas en la centra urba parko en antikva 2 500-jara Samarkando, iama lulilo de la orientaj popoloj; metropolo de la vasta imperio de Timur, hejmo de grandaj scienculoj, filozofoj, poetoj; grandvalora trezorejo de kulturo.

Situante sur la Granda Silka Vojo, Samarkando ĉiam havis multajn kulturajn tradiciojn kaj ligojn kun malproksimaj lokoj. Tiel tute ne estas mirinde, ke ĝuste ĉi tie en 1986, la Internacia Jaro de Paco, estis inaŭgurita la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, la unua ĉi-speca institucio en eksa USSR kaj poste KSS. Ties organizintoj kaj ĝisnunaj prizorgantoj estas lokaj esperantistoj-aktivuloj de Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco.

Verdire mi mem ne supozis, ke tiom rapide kaj mondvaste oni subtenos nian iniciaton. Tio montras, niaopinie, ke ĉie la homoj pensas antaŭ ĉio pri paco, homrajtoj kaj protekto de la unusola mondo, kiun ni havas.

Pecetoj de la Berlina Muro (rui-nigita simbolo de kontraŭstaro inter Oriento kaj Okcidento), partoj de sovetiaj kaj usonaj mezdistancaj nukleaj raketoj (neniigitaj konforme al la respektiva kontrakto

inter USSR kaj Usono), atombombitaj fragmentoj de la tegmenta tegolo el Nagasaki (bruligitaj dum la atoma tragedio en aŭgusto 1945 kaj poste trovitaj je la distanco de 1 000-1 200 metroj for de la eksploda centro), kapsuloj kun grundoj el la loko de Stalingrada Batalo kaj el la fifama nazia koncentrejo Auschwitz (dum la dua mondmilito barbara mortigejo por preskaŭ 4 milionoj da homoj de multaj nacioj), sunenergia forno, originalaj afiŝoj, artaĵoj, libroj, flagoj, insignoj, medaloj, T-ĉemizoj, dokumentoj... kaj multon alian vi povas vidi en la unika muzeo.

Ties ekspozicio emfazas la mondskanan movadon por la prioritato de la universalaj homaj valoroj kaj urĝa neceso, ke tiu ĉi prioritato estu praktikata en la internaciaj rilatoj. La Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro kreigis rezulte de tiu ĉi nova politika pensado kaj popola diplomatio.

La muzea kolekto nun amplek-

Laborantoj de la muzeo

sas ĉ. 20 000 diversspecajn ekspoziciajn el 100 landoj, temantajn pri la universalaj homaj valoroj kaj la globskalaj defioj, kiujn nun estas devigata alfronti la homaro. La muzeo regule ricevas materialojn de multnombraj registaraj kaj neregistaraj organizoj kiel Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO, Komisiono de Eŭropaj Komunumoj, Monda Konsilio de Eklezioj, Monda Banko, Internacia Deviza Fondaĵo, Internacia PEN-Klubo, UEA... Inter ili estas ankaŭ Ĉina Popola Asocio por Paco kaj Malarmado, Ĉina Radio Internacia, la redakcio de El Popola Ĉinio.

Donacoj de diverslandaj artistoj, pledantaj por la pli bona mondo, formas la muzean sektion "Belo savos la mondon" (belo de la naturo, belo de la amikeco, belo de la amo, belo de la paco). Interalie ĉi tie videblas japana kaj korea kaligrafioj...

Esperanto-sekcio prezentas materialojn pri la internacia





Ekspozicio de la muzeo

E-movado kaj ties grava rolo en proksimigo de diverslandaj kulturoj, en interkomprenigo, interkonigo kaj amikigo de la homoj surbaze de “neŭtrala lingva fundamento”. Ni menciuj ĉi tie ankaŭ kelkajn aliajn internacilingvajn projektojn de la muzeo.

La Aŭtografo de Paco celas kolekti kaj ekspoziciigi subskribitajn fotojn, personajn mesaĝojn kaj aŭtografiitajn aŭtorajn verkojn de famaj homoj de la nuntempa mondo: elstaraj verkistoj, poetoj, sciencistoj, politikistoj, sociaj agentoj, ĵurnalistoj, artistoj, astronautoj k.a. Afable aliĝis al la projekto kaj sendis al ni konvenajn materialojn Japana esperantisto s-ro Tutomu Nisio (sidanta dekstre) inter la aktivuloj de la muzeo

ĝenerala sekretario de UN. Boutros Ghali, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato Juan Antonio Samaranch kaj multaj aliaj famuloj. Mi plezure invitas partopreni en tiu ĉi projekto ankaŭ Esperantlingvajn aŭtorojn, kiuj certe povus interese kompletigi nian belan kolekton de aŭtografiitaj libroj kaj aliaj artaĵoj.

Kadre de la projekto “La Tero tra la Okuloj de Infanoj de la Mondo” ni regule aranĝas grandskalajn infanartajn ekspoziciojn el diversaj landoj.

La projekto “La Granda Silka Vojo” celas revivigi la multjarcentajn tradiciojn de tiu ĉi antikva

ponto de kontaktoj kaj interŝanĝoj, surbaze de popola diplomatio kontribui al kontaktigo, partnerigo kaj kunlaborigo de uzbekaj kaj alilandaj entreprenistoj kaj fakuloj...

De tempo al tempo ni organizas ekspoziciojn ankaŭ eksterlande (ekz. en Francio, Rusio kaj Nov-Zelando) helpe de niaj tieaj partneroj kaj amikoj. Pri la agado kaj iniciatoj de la muzeo sufiĉe ofte raportas loka kaj respublika gazeto, radio kaj televido, en nia centra regiona tagĵurnalo de pluraj jaroj ni prizorgas specialan konstantan rubrikon “La Poŝto de Paco”, kie interalie ni aperigis korespondadojn de multaj diverslandaj esperantistoj.

Fakte ĉiu vizitanto sentas la sincerecon kaj universalecon de la organizantoj kaj kontribuantoj de la muzeo. Tuj sentblas, ke la paco kaj la sana vivmedio estas tio, kion la homoj volas plej multe, kaj ke ili pretas labori kune por humanigi la internaciajn rilatojn kaj protekti la Teron — nian komunan kaj unusolan Hejmon. Ja hodiaŭ ne estas pli grava tasko ol konsciigi ĉiujn homojn pri la danĝeroj nun minacantaj la vivon mem sur nia planedo.

Estante senprofitcela sendependa neregistara institucio, la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro dependas grandparte de volontula laboro kaj kontribuoj de individuoj kaj grupoj tra la mondo. Ni kore invitas ĉiujn legantojn de “El Popola Ĉinio” viziti nian muzeon. Gastoj estas ĉiam bonvenaj samkiel proponoj, konsiloj, donacoj... Se vi volas subteni nian E-iniciaton, bonvolu kontakti nin letere, telefone, telekse: Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, P.O. Box 76, UZ-703000 Samarkand, Respubliko Uzbekistano. Kontakta telefono: F7(3662) 33 17 53. Telekso 116544 SAGAT SU Esperanto. ■

* La aŭtoro estas direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, prezidanto de loka E-klubo.



ESP-NOVAĴOJ

● Por festi la 10-an datrevenon de la fondiĝo de la Liaoning-a E-Asocio kaj Dandong-a E-Asocio, oni organizis aktivadojn de la 9-a ĝis la 11-a de junio 1995 en Dandong, Liaoning-provinco, inkluzive E-prelegojn de junuloj, junularan laborkunsidon, demonstron de kuracado per ĉigong-o, traktadon pri ekonomiaj, kulturaj kaj turismaj aferoj. Pli ol 70 esperantistoj partoprenis ilin kaj turisme vojaĝis sur Yalu-rivero kaj la Flava Maro. (Ma Fengchen)

● En la 6-a kaj 22-a de marto 1995 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio emisiis la poŝtmarkoseriojn "Progresigi Socion, Kunkrei Estontecon" kaj "La Strigoj". En la tagoj de emisio de la novaj poŝtmarkoj la Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis 3 stampilojn kun vortoj Esperantaj kaj ĉinlingvaj, kies desegninto estas s-ro Zhang Linrui.



Memorigaj poŝtstampoj kun vortoj Esperantaj kaj ĉinlingvaj

● Brita kristano-esperantisto s-ro David Featherstone vizitis Ŝanhajon en aprilo ĉi-jare. Dum sia restado en Ŝanhajo li partoprenis en E-aktivadoj de Ŝanhajo kaj prezentis la britan E-movadon al ĉinaj esperantistoj.

(Ji Yingeng)

● La aktivado de la Tuluza Esperanto-Redakcio ampleksigis kaj ebligis malfermi du novajn Esperanto-programojn en du pliaj radio-stacioj de la urbo, kies aŭskultantaroj estas tute malsamaj. Temas pri Radio Kanalsud kaj Radio Okcitanio.

Kuraĝigu, sendu informojn kaj

viajn eldonaĵojn al ili por helpi kaj subteni ilian agadon. Skribu al la redakcioj de:

Punt 6 Radio Esperanto-Redakcio "Internacia Voĉo"
Rabal de Rabuster N° 7 ES-43204 Reus Katalunio, Hispanio; Fréquence 4 Esperanto-Redakcio "La Ponto"
BP 36 FR-33015 Bordeaux Cedex Francio (R. Cash kaj F. Martorell)

● Kelkaj gejunuloj (re-)aliris la movadon, lastatempe, en la regiono de Marsejlo (Francio). Denove ili alten levas la verdan standardon kaj intencas plivigli la movadon ĉiamaniere kaj disvastigi Esperanton!

Ili ekeldonas novan gazeton dulingvan (franca k Esperanta), 12-paĝan (A4 formato) k monatan (po 10 ekz. jare), kies celoj estas samtempe reklamo por Esperanto, ligilo inter anoj (ekzemple: valoro k taŭgeco de Esperanto, spertoj, intervjuoj, literaturo, humuro, anoncoj, ludoj, E-kursoj ktp...) Ili pretas sendi provekzempleron kontraŭ unu internacia respondkupon al ĉiu petanto. La eventualaj eksterlandaj legantoj povos aboni, pagante nur la sendokostojn. La adreso: Centre Culturel Esperanto, Maison des Associations, 93, La Canebiere, 13001 Marseille, Francio. (Jean-François Bouveron)

● La 28-an de aprilo estis fondita nova E-Klubo Papilio en Kaunas. La klubo deziras korespondi kolektive kun aliaj E-grupoj tra la mondo, cele al estonta ĝemeligo, kaj ĉiuj klubanoj indvidue bonvenigas proponojn por interŝanĝo de leteroj kaj aliaj materialoj. Bonvolu adresi al: E-Klubo Papilio, Litova E-Asocio, a.d. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio.

(Litova E-Asocio)

● Kultura semajnfino: Viena Aŭtuno okazos en la Internacia Esperanto-Muzeo, la 21-an kaj 22-an de oktobro 1995. Programo:

Esperanto-kurso por tutkomencantoj, E-kurso por progresintoj (Nombro de partoprenantoj limigita en tiu grupo. Nepre antaŭ-aligu!) kaj aliaj. Sabate: 14h30-18h00, dimanĉe: 10h00-13h00. Aliĝ-kotizo: 300,-S, Triona rabato por (meti-)lernantoj, studentoj ktp. Speciala kotizo por ĉeĥoj, hungaroj, poloj, slovakoj, slovenoj... (60,-S, rabato plia por studentoj eblas) La adreso: Internacia Esperanto-Muzeo, A-1010 Wien, Hofburg. Michaelerkuppel, Aŭstrio.

(Herbert Mayer)

● La kultura semajnfino en Bratislava okazos la 28-an kaj 29-an de oktobro 1995. Temo: Strategiaj problemoj de la Esperanto-movado. Paralele: Esperanto-kurso por komencantoj. Adreso por pliaj informoj: Esperanto-Societo '95, Raĉianska 80, SK-821 01 Bratislava, Slovakio.

(Herbert Mayer)

● La 7-an de aprilo okazis en la Aŭtonoma Universitato de Barcelono, Hispanio, en la urbo Bellaterra, simpozio pri nefortaj lingvoj en Eŭropo, organizita de Sieti. Partoprenis 8 prelegantoj pri la lingvoj. Nome de Esperanto, s-ro Giordano Moya prezentis la ideon, ke la registaroj kaj parolantoj de nefortaj lingvoj, por protekti kaj defendi siajn lingvojn, devus subteni la uzadon de Esperanto en internaciaj kongresoj, kun la celo ke iom post iom la 6 aŭ 7 lingvoj, kiuj kontrolas la internaciajn kongresojn, perdu sian hegemonion kaj estontece finiĝu la lingvaj diskriminacioj. Pli ol 100 gestudentoj sekvis la debatojn tre atente.

(Salvador Aragaj)

Esperantaj eldonaĵoj eksponataj en la tradicia festo de Barcelono



Patro de ĉina moderna pentrarto

— Memore al la 100-a datreveno de la naskiĝo de Xu Beihong

ONI rigardas lin kiel patron de ĉina moderna pentrarto. Se li vivus, li estus 100-jara. Sur la memportreto li estas juna, sed en liaj okuloj troviĝas tiel multe da melankolio, ke post renkontiĝo kun lia rigardo nenies koro povus resti facila.

“Li forpasis 58-jara, tro frue!” iu suspiris kun bedaŭro en la Ekspozicio Memore al la 100-a Datreveno de la Naskiĝo de Majstro Xu Beihong. Jam estis la lasta tago por la ekspozicio, tamen ankoraŭ multaj homoj venadis al la Ĉina Belarta Muzeo.

Apud la memportreto estas foto nebula pro tempopaso. Jen estas urbeto Qitingqiao de Yixing en Jiangsu-provinco. Li pasigis sian interesan enhavriĉan infanecon en tiu akvolando sude de Yangzrivero, kie kviete fluas rivero, arke kuŝas ponto, kaj sub la ponto lignaj boatoj trapasas. Ĉe la rivereto estas dometo, kie naskiĝis la majstro.

La patro de Xu Beihong estis s-ro Xu Dazhang, fama pentristo de la loko, kiu lertis en verkado de poemo, kaligrafio kaj sigelila gravurado; lia patrino Lu estis bonkora kaj honesta vilaĝanino. La 6-jara Beihong eklernis de sia patro legadon kaj skribadon; en la aĝo de 9 jaroj li komencis paŭsi kaj skizi. Foje Xu Dazhang revenis hejmen kaj demandis: “Kiu vizitis?” Beihong tuj desegnis portreton de la vizitinto sur sia mano, kaj la patro tuj rekonis.

Per siaj profunda ekzerciteco pri antikva ĉina literaturo kaj elstara pentra kapablo, tiu kampara knabo, kiu neniam vizitis lernejon, trapasis la eniran ekzamenon por la Franca-literatura Fakultato de En la ekspozicio

Zhendan-universitato de Ŝanhajo en sia 21-a jaro kaj poste li estis engaĝita kiel instruisto pri pentrado en Mingzhi-universitato. Sed li maltrankviliĝis pro la ĉina pentrista rondo katenita de rutinismo en la lastaj 300 jaroj. Ĉu en enhavo ĉu en formo oni tute simiis antikvulojn, ke ĉiu streko estis trovebla en la verkoj de antikvaj pentristoj. Iliaj penso kaj peniko tute rigidigis. Kiel oni povos elimini la rutinismon por progresigi ĉinstilan pentrarton? Li deziris konigi al Ĉinio la bonan teknikon de la eŭropa pentrarto.

Junulo longe staris antaŭ la granda pentraĵo de Xu Beihong “Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo”. Pro laco li sidigis sur la plankon, sed lia rigardo fiksiĝis sur la pentraĵo. Li vizitis la ekspozicion jam sinsekvajn tri tagojn.

Antaŭ pli ol 70 jaroj, ankaŭ Xu Beihong estis tiel absorbata kiel tiu junulo. En Pariza Muzeo, li vidis grandan olepentaĵon “Masakro en Chios” de Eugène Delacroix, fama franca majstro de romantika pentrarto en la 19-a jarcento. Sur la pentraĵo estas agonianta virino kuŝanta en sango, kaj sur ŝia brusto bebo suĉas la mamon baldaŭ velkontan... Xu Beihong ploregis en doloro.

Iu franca majstro, kiu bone desegnis vivon de fiŝistoj kaj kamparanoj, invitis Xu Beihong al sia ateliero. “Apelaciu por la tuta homaro”, la majstro diris paŝante malrapide. “Certe, tio bezonas kapablon. Vi devas rigore vin ekzerci en skizado kaj

Virino (Skizo)



detale esplori desegnadon de homa korpo. Gustumu la delikataĵojn kaj subtilaĵojn. Ne strebu por bela kaj brila streko,” li rigardis Xu. “Por fari tion, vi devas pene labori.”

Xu ne timis malfacilan vivon. Dum la 8-jara loĝado en Eŭropo, la stipendio donita de la tiama ĉina registaro ofte estis prokrastita. Duonlernante kaj duonlaborante, li finis la studon pri la belarta historio de la Okcidento, la belarta teorio, anatomio, diorama ktp. Por studi kaj paŭsi famajn pentraĵojn de okcidentaj majstroj de diversaj skoloj, li pasigis postlecianan tempon en muzeoj kaj galerioj. Li ofte pentradis tra la tuta tago sen manĝi kaj trinki, ĝis fermohoro de la muzeo. Pro tio li serioze malsaniĝis je intesta konvulsio. Sur sia skizo Xu Beihong skribis: “Oni vidas mian pentraĵon, sed ne scias, ke mi faris ĝin en neeltenebla ventrodoloro.”

En la ekspona halo, mezaĝulo estis ĉirkaŭita de vizitantoj. Ili estis aŭskultantaj lian eksplikadon pri la pentraĵoj de Xu Beihong.

En 1927 Xu Beihong revenis al sia suferanta patrolando kaj instruis en belartaj kolegioj en Nankino, Chongqing, Guangxi kaj Pekino. Dume li verkis multe da grandaj pentraĵoj, kiuj temas pri historio, sed enkorpiĝas lian deziron pri socia reformado. Li estis la unua, kiu en la ĉinstilano pentrarton enmiksas eŭropan manieron de desegno de homa korpo. Sur la pentraĵo “Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo” oni rimarkis, ke la posteuloj, kiuj transportadas ŝtonojn kune kun la Malsaĝa Avo por elhaki vojon, estas fortaj kaj muskolriĉaj, ne plu estas du-dimensiaj kaj maldikaj kiel en tradicia maniero de ĉinstilano pentrarto. Rigardante la skulptosimilajn figurojn, neniu dubas pri ilia fina venko. Tiu ĉi pentraĵo estis verkita en la jaro 1940, kiam la ĉina nacio troviĝis en danĝero.

Xu Beihong lerte aplikis la okcidentajn metodojn de anatomio kaj diorama por surpaperigi la plej vivecan momenton de diversaj animaloj: koko kokerikanta malgraŭ vento kaj pluvo, pasero batalanta kontraŭ ventego, leono vundita tamen ankoraŭ tenanta sian majestecon... Li apelaciis por la nacio sopiranta liberecon.

Xu Beihong ŝatis ĉevalon. Ĉevaloj en liaj pentraĵoj estas tre diversaj: Ili henas, ili muĝas, ili baŭmas, aŭ ili galopas. La majstro enkorpiĝis en ĉevalojn sian ĉagrenon por la suferanta popolo.

Xu Beihong ne nur enkondukis okcidentan olepentradon en Ĉinion, sed ankaŭ montris kapablon de ĉina pentristo per siaj verkoj. En 1927 li sendis al la Tutlanda Belarta Ekspozicio de Francio 9 pentraĵojn, kaj ĉiuj estis akceptitaj. Reveninte al la hejmlando li verkis “Tian Heng kaj liaj 500 soldatoj” kaj “Atendi savanton”. La unua temas pri la antikva generalo Tian Heng de konkerita lando, kaj liaj 500 soldatoj, kiuj preferis morti ol kapitulaci; la lasta prezentas popolanojn tiranatajn de despoto, levanta




“Galopantaj Ĉevaloj” (Ĉinstila pentraĵo farita en 1942)

tajn sian kapon al la ĉielo por peti liberigon de eminenta savanto. Tiuj verkoj fundamentis la bazon de la ĉina olepentrarto.

Oni rimarkis, ke tiu mezaĝulo eksplikanta en nelaŭta voĉo tre similas al la majstro sur la memportreto: li ja estas s-ro Xu Qingping, filo de majstro Xu. Li sekvis sian patron — lerni pentrarton kaj la francan lingvon. Post peniga duonlaboro kaj duonlerno en Francio, li doktoriĝis pri belarta historio kaj nun instruas en la Centra Belarta Instituto de Ĉinio, kie lia patro laboris kiel ĝia direktoro. Li foriris de la patrolando kun densa nigra hararo kaj revenis kun maldensa kaj grizeta.

Inter la maljunaj vizitantoj troviĝis ankaŭ intimaj amikoj kaj instruistoj de Xu Beihong, kiuj speciale venis de diversaj lokoj por profunde riverenci antaŭ la portreto de la instruisto.

“Nia instruisto estas ankaŭ nia afabla patro,” ili diris.



S-ro Liu Boshu, direktoro de la Akademio de la Ĉinstila Pentrarto, klare memoras, ke 10-jara, li sendis sian paŭsaĵon de galopanta ĉevalo de Xu Beihong al li por peti lian instruon. La majstro skribis al li: "Frateto, por lerni pentradon vi devas preni la naturon kiel instruiston. Por desegni ĉevalon lernu de ĉevalo, por desegni kokon lernu de koko, mi skizis ĉevalon pli ol 1 000 fojojn..." De tiam, la eta Boshu fariĝis "koresponda lernanto" de la majstro. Poste li venis al Pekino kaj estis zorgata de la majstro en lernado kaj vivo. Fine li sukcesis studi en la Centra Belarta Instituto de Ĉinio.

Eminenta skulptisto s-ro Hua Tianyou estis filo de ĉarpentisto. Tiam li loĝis en la kamparo. Foje li skulptis la kapon de sia aminda 3-jara filo kaj sendis ĝian foton al Xu Beihong demandante pri ebleco fariĝi lia lernanto. Xu respondis: "Kiel la plej bona skulptisto de Ĉinio, vi ne bezonas fariĝi mia lernanto, vi estas mia amiko. Mi klopodos por sendi vin al Parizo, por ke vi tie studu kaj rigardu la verkojn de

mondfamaj skulptistoj en diversaj tempoj. Tio certe rapide progresigos vin, estas pli bone ol lerni ĉe mi." En 1933 Xu okazigis ekspozicion de siaj pentraĵoj en Eŭropo, kune vojaĝis tien Hua Tianyou, kiu poste estis rekomendita de Xu al la Belarta Instituto de Parizo, kie ĉi tiu iam studis.

"La gepatroj naskis min, kaj Beihong komprenas min", diris s-ro Qi Baishi; se ankoraŭ vivus tiu mondfama majstro de ĉinstila pentrarto, li certe venus hodiaŭ al la ekspozicio.

Fine de la 20-aj jaroj, Qi Baishi estis ignorata de la pentrista rondo, ĉar li estis iam ĉarpentisto. Sed en liaj pentraĵoj plenaj de vikleco kaj talento, s-ro Xu vidis, ke Qi ne estas artisto humilaĉa kaj flatema al la socia trivialeco. Li tri-foje invitis la maljunan pentriston al instruado de la ĉinstila pentrarto. Li proponis eldoni albumon de pentraĵoj de Qi Baishi, persone redaktis liajn pentraĵojn kaj verkis antaŭparolon por la kolekto.

Ekstere de la ekspozicia halo staris longa vico da



Portreto de Tagore

homoj, kiuj atendis por aĉeti albumon de la pentraĵoj de majstro Xu kaj peti subskribon de lia edzino s-ino Liao Jingwen. En tiuj tagoj s-ino Liao, direktoro de la Memorhalo de Xu Beihong, senĉese subskribis por la vizitantoj kaj laciĝis same kiel la tiama majstro, kiu okazigis ekspozicion de siaj pentraĵoj en Singapuro kaj Malajzio. Tiam iris la Kontraŭjapana Rezistmilito en Ĉinio. Dum la ekspozicio s-ro Xu pene pentradis tage kaj nokte por kontentigi la aĉetantojn kaj tute oferis la enspezon al la ĉinaj militfugintoj kaj soldatoj en batalfronto. Li eĉ ne rezervis iom da mono por reveno. S-ino Liao diris: "Beihong vivis mallukse, ĉe budo de uzitaj varoj li aĉetis peltaĵojn kaj ledŝuojn, kiujn li portis ĝis sia forpaso."

Tamen, por aĉeti bonan pentraĵon, Xu ne hezitis pagi grandan sumon. En 1937 li trovis ĉe iu germana sinjorino la antikvan ĉinan pentraĵon "87 feoj", kiun li serĉadis en multaj jaroj. Li tuj aĉetis kontraŭ granda sumo da mono kaj sigelis ĝin per "Vivo de Beihong". "Mi elaĉetis ŝtatan trezoron," li diris. Sed poste en milito tiu trezoro estis ŝtelita, Beihong korŝiriĝis kaj ne manĝis nek dormis en tri tagoj. Lia sangopremo altiĝis ĝis 200 kaj malsaniĝis je nekuraĉebla hipertensio. Por elaĉeti tiun pentraĵon li poste elspezis preskaŭ sian tutan havaĵon, tamen li ĝoje diris: "Tio indas, indas."

Komercistoj ofte portis pentraĵojn de antikvaj majstroj al la hejmo de s-ro Xu, kaj li ofte ekzaltiĝis pro bona pentraĵo kaj ekstaze admiris ĝin. Rimarkinte tion, la komercistoj ofte plialtiĝis la prezon. La edzino atentigis lin post aĉeto kaj li kapjesis. Sed kiam li vidis alifoje bonan pentraĵon, li ankoraŭ agis kiel antaŭe kaj aĉetis kontraŭ altega prezo. Li rigardis tion "unu el la plej ĝojigaj aferoj en la vivo" kaj ofte diris: "Mi konservas ilin por la ŝtato." Lia edzino diris: "Do, post lia forpaso, laŭ lia deziro mi




"Fluganta Aglo" (Ĉinstila pentraĵo farita en 1944)

oferis al la registaro liajn ĉ. 1 200 konservatajn kaj ĉ. 1 200 verkitajn pentraĵojn kaj dek milojn da libroj kaj fotoj."

Estis baldaŭ fermota la muzeo, vizitantoj foriris kaj kvietiĝis en la halo, sed ankoraŭ iu sinjorino staris tie. Ŝi vidis la edzinon de la majstro kaj ĝoje diris: "Mi atendis vin jam tutan posttagmezon. Bonvolu subskribi por mi, sinjorino." ■



Memportreto de Xu Beihong



"Sur Qingcheng-monto" (Olepenraĵo farita en 1943)

Parto de "Atendi Savanton" (Olepenraĵo farita en 1933)



Huaihe-rivero en kontraŭpoluado

Teksto de **ZHENG ZHENJIE**

Fotoj de **DA WEI**

DUM mia oficejo ĝaŭ laŭ Huaihe-rivero mi vizitis multajn vilaĝojn kaj urbojn. Mi vidis, ke la poluado de Huaihe-rivero estas serioza, kaj ankaŭ la damaĝo kaŭzita de la poluado estas serioza, tamen reordigado de la rivero jam komenciĝis.

Mi veturis al Bengbu ĉe la malsupra baseno de la rivero, por intervjui respondeculon de la Komisiono de Huaihe-rivero sub la Akvoutiliga Ministerio de Ĉinio. Survoje mi trovis, ke multe da homoj irantaj al la laboro tenas en la mano plaston sitelon plenan de pura akvo. Pro scivolemo mi demandis iun el ili kaj eksciis, ke Huaihe-rivero, trairanta la urbon, estas poluata, pluraj akvoprovizejoj en la urbo desinfektis la akvon, ĉerpitan el la rivero, per likva kloro, tamen iuj el ĝiaj normoj ne atingis tiujn de la trinkebla akvo. Direktoro de iu akvoprovizejo diris al mi, ke oni engutigis natrian reakciilon en kranakvon purigitan per multaj procedoj, la akvo tuj ruĝiĝis kaj malklariĝis. Pura akvo neniel koloriĝas. Tial, oni kunportis puran akvon, ĉerpitan el la puto kun bonkvalita akvo, al la oficejo kaj tie boligis ĝin por infuzi teon. Kiam Huaihe-rivero estis serioze poluata, iuj povis nur aĉeti mineralan akvon en vendejo, pro tio portempe minerala akvo havis grandan debiton.

Verŝajne, por atingi pli evidentan efikon, oni devas alpreni pli efikajn rimedojn. En la lastaj jaroj oni funkciigis iujn malgrandajn paperfabrikojn, kemiindustriajn fabrikojn kaj tanejojn ambaŭflanke de la rivero por disvolvi vilaĝajn entreprenojn. Tiuj malgrandaj entreprenoj donis grandan profiton al la loka financo kaj iuj el ili eĉ helpis al la vilaĝoj forskui malriĉecon. Estas domaĝe, ke tiuj entreprenoj kun postĝinta teknologio kaj malaltnivela administrado konsumas tro multe da krudaj materialoj kaj energio, kaj sekve ili ellasas tro multe da malpuraĵoj. Tio drastigis la poluadon de la rivero. Ĉiutage ili forlasas en la branĉojn kaj trunkon de la rivero pli ol 7 milionojn da tunoj da malpura akvo. Somere

de 1989 la malpurakva konservejo de la paperfabriko de Wuyang-gubernio, Henan-provinco, enfalis, granda kvanto da malpura akvo tra Yinghe-rivero enfluis en la trunkan riveron, kaj tiel formiĝis 90-kilometra poluanta zono.


Kial la paperfabrikoj ne havas kontraŭpoluan ekipaĵon? La paperfabrikoj ĉe Huaihe-rivero plejparte prenas la tritikan pajlon kiel materialon. La papero el tia pajlo estas bonkvalita, tamen estas tre malfacile trakti la malpuran akvon. Nun eĉ riĉaj regionoj en Ĉinio ne havas taŭgan traktejon

por purigi tian akvon, por ne paroli pri la lokoj kun postĝinta ekonomio ĉe la rivero.

Se tiel, ŝajne la plej bona rimedo estas malfunkciigi tiujn malgrandajn poluantajn entreprenojn. Koncerna departemento ankoraŭ ne volas akcepti tiun rigoran rimedon. Sen tiuj fabrikoj kiamaniere oni enpostenigos tiom da laboristoj? Kaj plie, por tiuj neriĉaj regionoj ĉe Huaihe-rivero fermi iliajn fabrikojn ja signifas ĉesigi ilian financon. Kiel oni povas fari la decidon?

Kun klara kono pri la malutilo de poluado oni tamen daŭre produktas poluaĵon. Tio ĝenas la basenon de Huaihe-rivero. Iuj opinias, ke por disvolviĝantaj landoj en la unua etapo de industria disvolvigo la plej grava estas disvolvo, kaj la poluado — neevitebla. Tamen, la ĉina registaro, kiu prenas sur sin la taskon servi al la plej vastaj popolamasoj, vizaĝe la seriozan realecon, opinias, ke disvolvo estas grava kaj mediprotektado same grava. Se la medio estas detruita, la ekonomia disvolvo fariĝos neebla. La kruela leciono de iuj evoluintaj landoj, ke ili unue neglektis la poluadon kaj poste forigis ĝin, kiel spegulo avertas, ke la ĉinoj nepre ne preteratentu po-

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE HUAIHE-RIVERO



luadon, nek postlasu bedaŭron al posteuloj.


Ĉar la akvopoluado en la baseno de Huaihe-rivero jam malutilas al la ekonomia disvolvo kaj ĉiutaga vivo de la popoloj, la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko kaj la koncernaj ministerioj dediĉis al tio grandan atenton, decidis ĉiamaniere forigi la poluadon, por ke la rivero fariĝu klara antaŭ la fino de la 20-a jarcento.

Dum mia vizito en la baseno de Huaihe-rivero, mi informiĝis, ke jam komenciĝis la laboroj por reordigi Huaihe-riveron. Fine de 1994 oni jam fermis 191 entreprenojn, kiuj estis serioze poluantaj kaj malfacile reordigitaj. Marte de 1995 19 poluantaj entreprenoj estis fermitaj por reordigado. Ankaŭ la kvar provincoj ĉe Huaihe-rivero fermis respektive iujn lokajn entreprenojn por reordigado. Dank' al tiuj rimedoj la totala malpurakva kvanto enfluanta en la riveron reduktiĝos je 10% antaŭ la fino de 1995. Ankaŭ la kemia kaj malpezindustria ministerioj aktive subtenas tiun laboron. La Ĝenerala Federacio de Malpezindustrio de Ĉinio fermis 71 malgrandajn paperfabrikojn en la kvar provincoj ĉe la rivero kaj ordonis 54 gravajn poluantajn fontojn de paperfarado, ke ili ĉesu polui en difinita tempo.

Mi informiĝis de koncerna departemento, ke serio da orientoj kaj rimedoj por elimini poluadon de Huaihe-rivero publikiĝos unu post alia. "Provizoraj artikoloj por preventi kaj likvidi poluadon de Huaihe-rivero", la unua kodo por preventi kaj elimini poluadon de la baseno, estas farata. La programo por la "Plano '95 por preventi kaj elimini poluadon de Huaihe-rivero" jam estas ellaborita. La ellaborado de la tuta plano baldaŭ finiĝos. Publikigo de tiuj leĝaj dokumentoj puŝos la protekton de Huaihe-rivero kaj punadon al ĝiaj poluantoj en novan leĝohavan etapon.

Por elimini poluadon de Huaihe-rivero, la rimedoj alprenataj kaj alprenotaj estas: Ĉiuj poluantaj entreprenoj estu reordigitaj en la difinita tempo, alie ili estos fermitaj.

La Zhoukou-a Fabriko de Mononatria Glutamato ĉiujare produktas 100 000 tunojn da mononatria



Lakado de kluzo

triam glutamato kun marko Lotuso. Ĝia jara produktovaloro estas 2 miliardoj da juanoj (ĉ. 250 milionoj da usonaj dolaroj). La entrepreno ĉiutage lasas 40 000 tunojn da malpura akvo en Huaihe-riveron, sekve ĉiam pli akriĝas la konflikto inter la fabriko kaj la proksimaj suferantoj.

En 1994 la fabriko investis 24 milionojn da juanoj por konstrui mondnivelan anaerobian metanan konstruaĵon. La industria malpura akvo, traktita per la precipita rezervujo, reguliguj, pumpilo, mezurujo, cirkula pumpilo, metana disigilo, desulfigilo k.a., fariĝas metano, per kiu oni lumigas kaj kuiras. Ĝi ĉiutage produktas 3 000 kubmetrojn da metano kaj ekstraktas 23 tunojn da funga proteino. Dank' al tio pluraj laborejoj de la fabriko produktas en normala cirkulado.

Iutage mi vizitis hejmon de oficisto Wei Zhaotian en la loĝkvartalo de la fabriko. Mi vidis, ke lia edzino kuiras per metano. En la forno brulis blua flamo. Ŝi konigis al mi, ke ŝia familio, samkiel la najbaraj familioj, havas metanan tubon kaj fornon provizitajn de la fabriko. Ŝia tuta familio ĉiunmonate pagas ĉ. 50 juanojn por la metano-konsumo. Kuiru per metano estas multe pli pure kaj oportune ol per karbo.

Ankaŭ aliaj grandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, kiuj poluas Huaihe-riveron, jam ekuzis aŭ pretas uzi kontraŭpoluan ekipaĵon, kiel la Zhoukou-a Fabriko de Mononatria Glutamato. La unuapaŝa plano de la kvar provincoj difinis, ke laŭ la rivero konstruiĝos

Metano uzata en familio



Vilaĝo sur altaĵo





Huaibei-digo

Foto de HAN XIANZHI

Larĝigita riverparto ĉe Fengtaixia



La regadejo de mikroonda telekomunikado en la ĉefstabejo por reordigo de Huaihe-rivero




93 grandaj traktejoj de malpura akvo, kiuj ĉiutage traktos 4.53 milionojn da tunoj da malpura akvo, kun totala investo de ĉ. 5.6 miliardoj da juanoj. Laŭ la prikalkulo la tuta inĝenierio por reordigi Huaihe-riveron bezonos 12 miliardojn da juanoj.

Elimini la poluadon ĉe Huaihe-rivero estas granda afero dezirata de la bordanoj en multaj jaroj. Oni absolute ne devas emfazi ekonomian disvolvon kaj samtempe neglekti mediprotektadon. La kvar provincoj trafluataj de Huaihe-rivero kun granda loĝantaro kaj disvolviĝintaj vilaĝaj entreprenoj estas grandaj agrikulturaj provincoj. Se oni bone solvos la problemon pri Huaihe-rivero, la aliaj ĉeriveraj regionoj de Ĉinio faros laŭ ĝiaj spertoj en la reordigado.

La loĝantoj de la baseno de la rivero atendas la tagon, kiam Huaihe-rivero fariĝos pura kaj klara. ■

Konstruado de altaĵo por vilaĝo



JI PING:

ĈU ĈINOJ POVOS VIVTENI SIN?



Bovoj paŝtataj

JANUARE de la kuranta jaro prezidanto de la Usona Mond-observa Instituto kune kun aliaj 13 fakuloj publikigis Raporton Pri la Monda Situacio. La raporto montris, ke en 2030 Ĉinio devos importi 378 milionojn da tunoj da greno pro reduktiĝo de la agraro, malpliigo de la totala grena produktokvanto kaj rapida kreskado de la loĝantaro. Tamen ĝian bezonon oni ne povos kontentigi, ĉar nuntempe la grena eksportokvanto de la tuta mondo estas nur ĉirkaŭ 200 mil-

ionoj da tunoj.

Ĉu la rezulto estos tia? Ĉu la agraro de Ĉinio povos vivteni ĝian popolon per la greno produktita de ĝi mem en la 21-a jarcento? Tio estas multe atentata de la tuta mondo.

GRAVA DEFIO DE AGRIKULTURO

Ĉiuj scias, ke Ĉinio vivtenas 22% de la tuta homaro per 7% de la agraro de la mondo. Tio ja estas miraklo. Tamen en Ĉinio la ĉiam akriĝanta kontraŭdiro inter la produktado kaj konsumado de greno estas neignorebla.

En 1993 la grena produktokvanto de Ĉinio atingis 456.4 miliardojn da kilogramoj kaj per tio Ĉinio okupis la unuan lokon en la mondo. Tamen tiu cifero ne povis ĝojigi la ĉinojn, ĉar estas ankoraŭ granda la distanco inter Ĉinio kaj evoluintaj landoj de la mondo koncerne la pokapan kvanton de greno, kaj estas ankaŭ malrapida kresko de la ĉina grena produktokvanto. Kaj plie, la reduktiĝo de agroj kaj serioza akvomanko en multaj lokoj de Ĉinio eble kaŭzos pli seriozan malutilon al la grena produktokvanto.

Laŭ statistiko, en la venontaj 6 jaroj 3.6 milionoj da hektaroj da agroj estos okupitaj, kio malmultigos la grenan produktokvanton je 14.5 milionoj da tunoj, kiuj sufiĉas por vivteni 72.5 milionojn da homoj dum unu jaro. La industria konsumo de greno en 1994 estis pli granda ol tiu en 1990 je 20%. Ankaŭ la ĉina pokapa konsumo de viando, ovoj kaj lakto pli kaj pli grandiĝas. Se ĉiujare ĉiu ĉino manĝas viandon pli multe je unu kilogramo, do pli konsumiĝas greno je 5 milionoj da tunoj. Tio montris, ke en la fino de la 20-a jarcento, kiam la nombro de la ĉinaj loĝantoj atingos 1.3 miliardojn, kaj precipe en la 21-a jarcento, kiam la nombro atingos 1.6 miliardojn, Ĉinio devos respondi la defion en agrikulturo.

KIOM DA LATENTAJ FORTOJ ĈINIO HAVAS EN AGRIKULTURO?

Kvankam la kontraŭdiro estas serioza, tamen oni ne devas resti pesimisma. Parolante pri la perspektivo de grena problemo de Ĉinio en la venonta jarcento, Liu Jiang, ministro de la Ĉina Agrikultura Ministerio, diris, ke Ĉinio havos grandan latentan forton en agrikulturo.

Autau ĉio, 2/3 de la agroj en Ĉinio estas mez- kaj malalt-produktaj, kiuj certe fariĝos pli produktivaj dank' al pliboniĝo de la produktaj kondiĉoj. Ekz. antaŭ 10 jaroj la ebenaĵo ĉe la Flava Rivero, Haiherivero kaj Huaiherivero estis ofte atakata de naturaj katastrofoj kaj tie la grena produktado iris ne stabile, tamen post sintezaj ekspluatado kaj reguligado de la akva sistemo, ekologiaj kondiĉoj kaj alprenado de novaj teknikoj kaj aliaj rimedoj, pli ol 3.33 milionoj da hektaroj da agroj fariĝis mez- aŭ alt-produktaj. Kaj la loko fariĝis unu el la gravaj grenaj bazoj de Ĉinio. Nuntempe en Ĉinio sciencoj kaj teknikoj ludas rolon nur je 35% en plimultiĝo de

grena produktokvanto, sed en evoluintaj landoj ilia rolo estas duobla. Kaj en Ĉinio 2/3 de la scienc-esploraj fruktoj estas ankoraŭ ne vaste aplikataj. Tio montras, ke sciencoj kaj teknikoj havas grandajn latentajn fortojn en agrikulturo de Ĉinio.

Nun en Ĉinio estas 33 milionoj da hektaroj da virga tero, 130 milionoj da hektaroj da sterilaj montoj kaj marmalprofundaĵoj, 260 milionoj da hektaroj da stepo kaj grandarea dezerto, 4 milionoj da kvadrataj kilometroj da mara areo. Se ilin oni plene kaj racie ekspluatos kaj utiligos, Ĉinio povos vivteni 1.6 miliardojn da loĝantoj en la estonteco. Laŭ statistiko de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio, Ĉinio havos 113 milionojn da hektaroj da agroj kaj la greno produktota de ĝi sufiĉos por la ĉinaj loĝantoj antaŭ la fino de la 40-aj jaroj de la 21-a jarcento.

Ekde la komenco de la 90-aj jaroj, la Ĉina Agromonia Akademio, Pekina Agromonia Universitato kaj Ĉina Akademio de Sciencoj faris esploradon per malsamaj metodoj, kio montris, ke kondiĉe de la aplikado de la nunaj teknikoj kaj la plej bona administrado, Ĉinio povos produkti 0.8 ĝis 1 miliardon da tunoj da greno ĉiujare. Tiu sumo estas duoble pli granda ol la nuna. Se ĉiu konsumos 500-550 kilogramojn da greno, do ĝi povos vivteni 1.53-1.69 miliardojn da loĝantoj.

“KUN AGRIKULTURO KIEL FUNDAMENTO”

Vizaĝe al la nuna stato kaj serioza situacio de la ĉina agrikulturo, la ĉina registaro kaj koncernaj departementoj faris neŝanĝeblan decidon: plimultigi investaĵojn al agrikulturo kaj alpreni efikajn rimedojn por akceli ĝian disvolviĝon. Nun la ĉina registaro faras ĉion eblan por solvi la problemon pri manĝaĵoj de pli ol miliardo da siaj loĝantoj, ĉar ĝi estas klara, ke tiuflanke ĝi ne devas nek povas meti sian esperon sur aliajn landojn. Ĉinio nepre devas daŭre praktiki aŭtarĉian politikon “rigardi agrikulturon kiel sian fundamenton”. Ĝuste pro tio, Ĉinio alprenis serion da rimedoj en la lastaj 2 jaroj, ekz. plialtigi prezojn de greno kaj kotonon, protekti agrojn, pli multe investi agrikulturon, akceli la agraran akvoutiligan konstruadon, disvolvi agrikulturon per sciencoj kaj teknikoj, kuraĝigi certagradan agraran entreprenadon, serioze praktiki la politikon pri naskolimigo.

Antaŭ nelonge, la Ĉina Agrikultura Ministerio ellaboris planon pliprodukti grenon je 50 milionoj da tunoj en la venontaj 6 jaroj. La plano enhavas jenajn:

Transformi 24 milionojn el la 60 milionoj da hektaroj da agroj. Se oni pliproduktos 1 500 kg. en ĉiu hektaro da agroj kaj kulturos grenon sur nur 3/4 de la transformitaj agroj, do 27 milionoj da tunoj da greno estos pliproduktitaj. La Nordorienta Ebenaĵo, la Ebenaĵo ĉe la Flava Rivero, Huaihe-rivero kaj Haihe-rivero kaj tiu ĉe la meza kaj malsupra



En granda forcejo

Yangzi-rivero estos ĉefa loko por transformado. Samtempe oni popularigos la kutimajn teknikojn sur la portempe netransformeblaj agroj por pliprodukti grenon je 10 milionoj da tunoj.

Disvolvi interplantadon kaj ekspluati la vintran agrikulturon en suda Ĉinio. Tio signifas ekspluati 3.3 milionojn da hektaroj. Se sur duono de la agroj oni kulturos grenplantojn, do pli ol 6.2 milionoj da tunoj da greno estos ricevitaj.


Ekspluati 2.4 milionojn da hektaroj da virga tero en la Nordorienta Ebenaĵo, Xinjiang kaj Gansu, kio povos pliprodukti grenon almenaŭ je 8.5 milionoj da tunoj.

Konstrui en 378 gubernioj grenajn bazojn ŝtat-nivelajn, kio liveros pli ol 15 milionojn da tunoj da greno antaŭ la fino de la 20-a jarcento.

Pliprodukti kemisterkon je 27 milionoj da tunoj. Tiam 90% de kemisterko bezonata de Ĉinio estos garantiataj kaj la azotosterko estos sufiĉa por Ĉinio.

Pliirigacii agrojn je 4 milionoj da hektaroj. Nun en Ĉinio estas irigaciata nur duono de la agroj, kiu tamen produktas 2/3 de la totala produktokvanto de la greno de la tuta lando. En la lastaj jaroj, Ĉinio donis grandan atenton ne nur al produktado de herbovoraj bestoj, sed ankaŭ al konstruado kaj plibonigo de herbejoj. Kaj por brede brutojn oni energie ekspluatis surogatojn de greno por nutri brutojn. Ĉinio ĉiujare havas 500 milionojn da tunoj da uzablaj plantaj tigoj. Se 10% de ili estos transformitaj en brutonutraĵon, do estos ŝparitaj 20 milionoj da tunoj da greno; se 50% de ili transformiĝos en brutonutraĵon, do 100 milionoj da tunoj da greno estos ŝparitaj. La ĉina registaro plurfoje montris, ke por ŝpari grenon Ĉinio devas produkti vinon el vinberoj kaj aliaj fruktoj.

Kvankam la perspektivo estas brila, tamen Liu Jiang emfazis: “Ĉinio havas tro multajn loĝantojn kaj tro malmultajn agrojn, kio rezultigas, ke en la venontaj jardekoj la problemo pri greno en Ĉinio restos granda kaj neignorebla. ■



Parto de Handan

FAMAJ URBOJ


HANDAN, URBO DE ANTIKA KULTURO

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

Cizhou-porcelanaĵo



Volbo de Yuhuang-pavilono konstruita antaŭ 3 000 jaroj




Handan situas en suda Hebei-provinco, oriente de Taihang-montaro kaj okcidente de la Nordĉinia Ebenaĵo. Ĝi estas civilizita urbo kun historio de 3 000 jaroj.


En 1973 oni elterigis tie en la ruino de Cishan-kulturo pli ol 5 000 historiajn objektojn, kiaj ŝtonaj laboriloj, fajencaĵoj, ostaĵoj, fosilioj de kortobirdoj kaj karbonido de milio. Cishan-kulturo estas grava eltrovo de neolitikaj elfosaĵoj. Ĝi naskiĝis pli frue ol Yangshao-kulturo. La eltrovo datis la ĉinan neolitikon je mil jaroj pli frue. La elterigo de milio renovigis la konon pri la milio-epoko en la monda agrikultura historio.

Jam en la lastaj jaroj de Shang-dinastio (17-a jc. a.K. — 11-a jc. a.K.) Hadan fariĝis grava urbo kaj poste estis ĉefurbo de Zhao, unu el la 7 Militantaj Regnoj (475 a.K. — 221 a.K.) kaj unu el la 5 grandaj komercaj urboj en Han-dinastio (206 a.K. — 220). La gravaj epokoj ekde neolitiko postlasis pli ol 300 ruinojn en Handan.


Pro sia longa historio Handan ne nur estas riĉa je antikvaj kulturaj restaĵoj, sed ankaŭ estis sidejo de Cizhou-bakuloj, unu el la 5 grandaj antikvaj popolaj porcelanaj produktaĵoj. Porcelanaĵoj de Cizhou kun koloroj nigra kaj blanka estas originalaj en formo kaj glazuro. Ili profunde influis la ceramikan disvolviĝon de Ĉinio kaj la mondo.



Budho-statuo kaj pentraĵo en la ŝtonkavernaro Xiangtangshan



Antikva palaco sur krutaĵo




AMO

de MIAO TAO

MATENE silento regis sur strato. 18-aŭ 19-jara knabo malfacile iris sur dua-etaĝan balkonon ĉe stratangulo kaj per la manoj sin apogis sur la balustrado. Malsaneca, li enspiris freŝan aeron plenpulme kaj estis preta ridete donaci sian elkoran saluton al pasantoj preter la domo.

“Saluton, avo!” La unua ĝuanto



de lia saluto estis maljuna stratpurigisto.

“Saluton, knabo!” La maljunulo direktis sian rigardon al la malforta voĉo.

“Hodiaŭ la vetero estas tre bona. Ĝojon al vi dum la tuta tago!”

“Dankon!”

Poste paro da junaj geedzoj irantaj al laboro ricevis lian afablan saluton.

“Saluton! Feliĉon al vi!” la knabo svingis la manon al ili.

“Dankon! Ankaŭ al vi...”

La edzino foriris kokete sin apogante al ŝultro de sia edzo.

Pasis tago post tago. La knabo ĉiam akurate staris sur la balkono por ridete regali pasantojn per sia elkora saluto. Se pluvigis, li atentigis la pasantojn, ke ili ne falu.

Poste proksimaj loĝantoj, kiuj ĉu iris al laboro ĉu faris matenan korpo-ekzercadon, sciis pri la kna-

bo kaj ŝatis iri sur la strato. Por akiri lian saluton, iuj eĉ preferis iri pli longan vojon.

Unu jaron poste, la knabo ne vidiĝis sur la balkono. Pasis tagoj. Komence oni ne multe pensis pri tio kaj poste naskiĝis ĉe ili nekomprene pri lia neapero.

Iumatene, sub la balkono kolektiĝis multaj loĝantoj kvazaŭ interkonsentite, inter kiuj troviĝis la maljuna stratpurigisto kaj la juna geedza paro kun sia bebo.

Sur la balkono la patrino rakontis pri la filo.

Antaŭ kelkaj jaroj la knabo jam sciis, ke li estas trafita de ostokancero. Por li la plej neeltenebla estis ne la baldaŭa morto, sed la forta doloro kaŭzita de plivastiĝo de kancerĉeloj en lia korpo, kiuj nebligis al li ordinaran agadon. Nenion li povis fari krom saluto al aliaj ĉe tagiĝo, kun la celo, ke la ricevintoj de lia saluto havu bonan humoron por komenci novan tagon.

En tiuj tagoj la knabo dronis en ĝojo. Kvankam la plivastiĝantaj kancerĉeloj turmentis lin tute nokte kaj li nur per sendoloriga medikamento mildigis la fortan doloron, tamen ĉe tagiĝo li penegis ellitiĝis kaj iris al la balkono...

Antaŭ sia morto la knabo petis, ke la patrino transdonu lian lastan bondeziron al ĉiuj.

Por memori la bonkoran knabon, oni kutime nomas la straton Paca Strato... ■

(Daŭrigo de p. 11)

minutoj atingis ŝian nazon la sama bona aromo kiel antaŭe, sed kiam ŝi venis kolekti la bakitaĵojn, ŝi surpriziĝis. Sur la ŝtonoj kuŝis neplataj, malmolaj flanelkrustoj, sed diversformaj pufiĝintaj bulkoj. Rompinte unu el ili, ŝi rimarkis, ke sub la kraketanta bruna krusto estas pli hela molaĵo. Ĉar kelkaj el la

bulketoj ruliĝis de sur la ŝtonoj inter la braĝojn, ŝi gustumis ankaŭ ilin kaj trovis, ke pro mikado de la pasto kun la cindro, ili havas agrablan, salan guston.

Vespere la viroj pensis nur pri bierdrinkado, kaj la novedzinoj devis senĉese plenigi iliajn pokalojn. Dum ili kontentigis sian soifon, Panjo Kusabolo alportis bovlojn da leporstufaĵo kaj sur teleretoj

kelkajn ankoraŭ varmajn bulkojn. Ĉiuj avide manĝis ilin.

Ekde tiu tago la bofilinoj ricevis instrukciojn, ke, okaze de bierfardo, ili knedu grandan kvanton da fermentinta pasto, por ke Panjo Kusabolo povu baki freŝan panon por la familio. Rekompence, ŝi ricevu ĉiutage tutan poton da biero.

Tio estas la vera historio de la malkovro de pano. ■

Gustoplena novjara bildo de Mianzhu

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

LA Printempa Festo estas tradicia novjara festo en Ĉinio. Ĝi estas la plej grava festo por la ĉinoj. Kelke da tagoj antaŭ la festo, la kamparanoj purigas sian domon kaj gluas bildojn sur la pordon, fenestron kaj muron kaj eĉ pendigas bildojn en grentenejo kaj stalo. Dank' al tiuj novjaraj bildoj la festa etoso estas multe plifortigita.

En la kamparo oni tre ŝatas novjarajn bildojn faritajn de kamparanoj. La gubernio Mianzhu en la okcidenta Sichuan-provinco estas loko ĝuanta famon pro siaj novjaraj bildoj.

En Mianzhu oni produktas bonajn vinojn, kaj vino ofte estas temo de novjaraj bildoj. Ni prenu kiel ekzemplon jenan bildon: Sur novjara bildo estas du ratetoj, gaje kaj avide portantaj grandan vazon da vino. Sur la vazo estas ideogramo "feliĉo", signifanta nupton. La aŭtoro pentris ne kutiman doton, sed vinon avidatan de ratetoj.

Sur novjaraj bildoj oni pentras ankaŭ moron de la lokanoj. La novjara bildo "Ĝoje renkonte al printempo" montras la gajan scenon de la kamparanoj en festado de printempokomenco: La celebrantoj bastonas paperan bovon, kaj kreviĝas ĝia ventro — jen elfalas el la ventro bovido kaj spikoj de greno. Ĉe tio ĝoje huraas la ĉeestantoj pro la bona aŭguro.

Mianzhu estas antikva kultura urbo, kaj teatro prosperis tie jam pli ol 1 000 jarojn. En la epoko sen filmo kaj televizio, la novjaraj bildoj temantaj pri Sichuan-a opero fariĝis la plej ŝatataj distraĵoj de kamparanoj. Ili estis pendigitaj en vestiblo kaj dormoĉambro. La kamparanoj neniam tediĝas de la bildoj, ĉar ili povas ofte apreci la bildojn zumante fragmentojn el la dramo pripentrita en la bildo por sin amuzi, aŭ distras infanojn per rakontado pri la



S-ino Yao Chunyun en pentrado

teatro. Novjaraj bildoj multe gajigas la vivon de la kamparanoj.

Ankaŭ diversaj dioj estas ĉefroj sur la novjaraj bildoj. Pordogarda Dio, Kuireja Dio... ĉiuj fidele plenumas sian devon por protekti la dommastrojn.

La novjara bildo de Mianzhu similas al ksilografiaj. Unue oni skize faras bildon per ksilografio, poste farbas ĝin per diversaj koloroj kaj fine pentras sur la vizaĝo. Metiistoj observas la rutinon, ke unue nigra koloro por konturo, due blanka koloro por la vizaĝo kaj manoj, trie ora koloro por ĉapo kaj rekvizitoj, kaj diversaj koloroj por vestoj. Tio estas la regulo de farbado de novjaraj bildoj de Mianzhu.

Oni faras novjarajn bildojn en sia hejmo, ke ĉiu membro plenumas unu saman ĉeneron de la tuta procedo. Sed la pentrado de okuloj estas plenumata de pli aĝa familiano, kiu, ĝenerale dirite, estas ankaŭ plej lerta artisto en la familio. Tiusence novjara bildo estas verko de kolektivo, nome la familio. Tiuj familioj faras novjaran bildon jam multajn generaciojn. 98-jara majstro s-ino Yao Chunyun eklernis farbadon en la aĝo de 6 jaroj. Grandaĝaj figuroj en ŝiaj bildoj montras sian altan nivelon. Per sia plata tuĉpeniko duone kun tuĉo kaj duone kun akvo, ŝi facile desegnis barbon tre similan al la vera.

Unu el la specoj de la novjaraj bildoj de Mianzhu ne estas ksilografie farita. Ĝi estas tre valora pro malmulteco. La materialo de tia bildo estas malpli delikata ol tiu por ordinaraj bildoj. Tia bildo estas rapide improvizita de artistoj sur ĉifita papero, per akvo uzita por lavado de farbopelvetoj. La pentristoj ne bezonas fari konturon, sed rekte farbas sur la papero, tute laŭ sia ideo, tial novjara bildo de tiu speco estas simila al ĉinstila pentraĵo, kaj krome tiaj pentraĵoj ne estas multaj, tial ili vekas pli grandan



Parto de "Goje renkonte al printempo"

"Vektoportado"

de LIU ZHUMEI



intereson de la homoj.

Oni ne povas precize datumi la originon de la novjaraj bildoj de Mianzhu, sed tiu arto havis sian plej prosperan epokon en Qing-dinastio (1644-1911). En historiaj libroj oni notis, ke tiam en la gubernio estis pli ol mil metiistoj de 300 familiaj laborejoj, kiuj faris ĉiujare 12 milionojn da novjaraj bildoj. Preskaŭ en ĉiuj restoracioj kaj tetrinkejoj en la gubernia urbo kaj la kamparo estis standoj de novja-

raj bildoj. En junio tie kolektiĝis komercistoj de diversaj lokoj, kiuj alportis siajn lokajn produktaĵojn kaj foriris kun granda nombro da novjaraj bildoj por vendi ilin en najbaraj lokoj Yunnan, Guizhou kaj Tibeto kaj ankaŭ en Sudorienta Azio.

Post foriro de alilokaj komercistoj la metiistoj komencas akcepti lokajn komercistojn, kaj en vintro ili mem podetale vendas novjarajn bildojn, ĉar baldaŭ estos la Printempa Festo. ■



"Tri simioj ludas kun porko."



"Dio de Korto"

"Palacaj knabinoj"
de YAO CHUNYUN



HEBEI MALFERMIS SIAN PORDON

MI donis al mia artikolo tiun titolon ne pro tio, ke Hebei-provinco vere havas neordinaran pordon, sed pro tio, ke Hebei-provinco bonvenigas pli multajn eksterlandajn komercistojn partopreni en ĝia ekonomia konstruado kaj ekspluatado de riĉfontoj. Tiasence, Hebei-provinco antaŭe ne sufiĉe larĝe malfermis sian pordon, kiu estis plenplene malfermita nur en la lastaj kelkaj jaroj.

EDIFO DE EKSPRESA ŜOSEO

Ni per aŭto veturis orienten tra kelkaj kvartaloj de Pekino kaj jam troviĝis en Hebei-provinco nur post iom pli ol unu horo.

Pro sia najbareco al Pekino, Hebei-provinco nature havis multajn rilatojn kun imperiestraj familioj en la feŭda epoko. Nun en la provinco ankoraŭ videblas multaj bone protektataj imperiestraj palacoj, ĝardenoj, akademioj, maŭzoleoj kaj aliaj konstruaĵoj, pro kio ĝi fariĝis unu el la provincoj kun multaj historiaj restaĵoj.

Antaŭe en mia kapo Hebei-provinco estis provinco nur kun forta agrikulturo kaj pri ĝia industrio mi ne bone sciis, tamen dum la ĉi-foja vizito al la provinco mi in-

formiĝis, ke ne nur ĝi havas superecon en riĉfontoj, sed ankaŭ ĝia industrio estas kompleta. Sin trovas en la unuaj vicoj ĝiaj kampoj tekstila, konstru-materiala, metalurgia kaj medicina. Kaj ankaŭ ĝia fervoja transporta kvanto kaj ŝarĝkaj maŝarĝ-kvanto de ĝia haveno Qinhuangdao estas ege grandaj kaj ĝia sinteza ekonomia forto jam okupas la 8-an lokon en Ĉinio.

Antaŭe ne alportis al ĝi multan bonon la supereco de ĝiaj geografia situo kaj riĉfontoj, inkluzive de multa investado kaj politikoj ellaboritaj de la ŝtato favoraj al ĝi. La Hebei-anoj estis tre singardemaj eble pro tio, ke ili loĝas proksime de Pekino. Tial, kiam en ĉemaraj regionoj de orienta Ĉinio la homoj viglis en la ekonomia reformado, la Hebei-anoj ankoraŭ montriĝis kontentaj pri sia memsufiĉa vivo.

Iu rakontis al mi, ke kiam konstruiĝis enirejo de Langfang ĉe la ekspresa ŝoseo inter Pekino kaj Shenzhen, Langfang-anoj senhezite donis al ĝi la nomon Nanfangying laŭ ĉeloka nomo. Poste en Langfang konstruiĝis ekonomia kaj teknika ekspluatejo sankciita de la ŝtato. Kiam la ekspluatejo inaŭguriĝis, pli kaj pli multaj komercistoj ĉinaj kaj eksterlandaj venis al Langfang. Pro tio, ke oni

vidis vojmontrilon nur kun nomo Nanfangying, sed ne kun nomo Langfang, oni devis vane veturi sur la ekspresa ŝoseo por atingi la ekspluatejon.

Aŭskultinte lian rakonton, mi tuj rememoris la vortojn de mia amiko, kiu ĵus revenis la patrolandon de Usono: "Ĉu vi volas koni Usonon? Se jes, veturu sur ĝia ekspresa ŝoseo." Tio signifas, ke veturado sur ĝia ekspresa ŝoseo sentigas al veturantoj almenaŭ ĝian modernan civilizacion. Kiam nia aŭto veturis sur la ekspresa ŝoseo kaj preterfluge ĵetis la ambaŭflankajn kampojn malantaŭen, mi sentis, ke la moderna civilizacio jam floras sur la malnova kaj vasta tero de Hebei-provinco.

EKSPLUATEJOJ EN RAPIDA DISVOLVIĜO


Ĉe la ekspresa ŝoseo ni vizitis laŭvice la urbojn Sanhe, Langfang kaj Baoding kaj fine atingis Shijiazhuang, la ĉefurbon de Hebei-provinco. Pro la hasta vizito multaj homoj kaj aferoj jam malklaris en mia kapo, tamen la ekonomiaj ekspluatejoj de tiuj urboj klare impresis min.

La ekonomia ekspluatejo estas kreaĵo de Ĉinio dum ĝia ekonomia reformado. El la aspekto de ekspluatejo oni povas scii, en kia gra-

La ekspresa ŝoseo inter Pekino kaj Shenzhen, tra Hebei-provinco



Laborejo de la Nordĉinia Farmacia Fabriko



do malfermigis la pordo de la regiono. Ĉar ekspluatejoj dependas de sia urbo kaj iuj eĉ fariĝas kvartalo. Tamen por la investantoj, kiuj investas ĉu multe ĉu mal multe, ĉu frue ĉu malfrue, estas nur unu celo: akiri pli multan profiton.

Por kio investi en Hebei-provinco? Bonvolu aŭskulti la investantojn.

La Sveda Sanddvik-a Internacia Kompanio Limigita, kiu ĝuas altan renomon en la mondo per siaj tranĉiloj, starigis fabrikon en Langfang por produkti mekanikajn instrumentojn per sia propra kapitalo. Al la fabriko la kompanio investis unue 4.5 milionojn kaj poste 45 milionojn da usonaj dolaroj. Enirinte en la ekspozici-halon de la fabriko, ni sentis nin kvazaŭ inter artaĵoj. La delikataj instrumentoj kiel artaĵoj interesis nin. La fabriko tute meritas la titolon de la unuaklasa internacia entreprenoj! Por kio multe investis en Langfang la Sveda Sanddvik-a Internacia Kompanio Limigita, kiu naskiĝis en 1862 kaj havas entreprenojn en pli ol 140 landoj kaj regionoj? En la ceremonio por celebri la plenumiĝon de la unuaj periodo konstruaĵo de la fabriko, sveda ambasadoro al Ĉinio, sinjoro Sven Linder, diris: "El la ekspluatejoj, kiujn mi vidis en Ĉinio, tiu de Langfang estas la plej bona. Mi invitos svedajn entreprenistojn, kiuj intencas investi en Ĉinio, rigardi la ekspluatejon de Langfang. Mia opinio, ankaŭ ilin interesos la loko." Mi pensas, ke la ambasadoro eldiris la korajn vortojn de la estraro de la Sveda Sanddvik-a Internacia Kompanio Limigita.

En Hebei-provinco troviĝas 20 diversspecaj ekspluatejoj. Plejparto el ili estas konstruita post 1992. Kaj en la ekspluatejoj ankoraŭ ne starigis multaj belaj konstruaĵoj kaj la totala sumo de la investita kapitalo estas malpli granda ol tiu en ekspluatejoj de aliaj provincoj. Tamen pri la estonteco de la ekspluatejo de Shijiazhuang, ĝia direktoro estas plena de memfido. Akompanante nin en la vizito de la

ekspluatejo, li diris, ke en nur iom pli ol 2 jaroj ili plenumis la laboron, kiun aliaj devas plenumi en 4 kaj 5 jaroj kaj eĉ pli longe. Tio faras investan medion pli bona kaj pli ideala. Kvankam ilia konstruo estis malfrua, tamen tio ebligis al ili lerni alies spertojn en konstruado kaj perfektigi la leĝan sistemon. Tie ĝenerale unusemajne eksterlandaj investantoj povas plenumi ĉiujn formalizaĵojn por starigi fabrikon en la ekspluatejo, sed ĉinaj investantoj pli rapide. La direktoro, kiu vivis multajn jarojn sur la stepo de Interna Mongolio, estas pekinano. Li, staranta sur ebena ŝoseo, vizaĝe al la fabrikaj domoj, kiuj ĉiuj jam havas sian propran mastron, multe parolis pri la ekspluatejo. Kaj ni aŭskultis kun granda scivolemo.

POST PORDOMALFERMO

Chen Liyou, vicprovincestro, konigis al ni, ke la rapideco de la ekonomia kresko de Hebei-provinco estis pli granda ol la mez-nombra rapideco de la tuta lando inter 1991-1994. En tiu tempo la provinco utiligis 1.698 miliardojn da usonaj dolaroj investitaj de eksterlandanoj kaj la sumo estis 4-oble kiom tiu inter 1949 kaj 1990. Kaj el 65 landoj kaj regionoj venis la investantoj, el kiuj nemalmultaj estas mondfamaj konsorcioj. Ili investis por ĉiuj kampoj, precipe por konstruo de fundamentaj instalaĵoj. Kaj ankaŭ ekspresa ŝoseo kaj elektrejo estas tre atentataj de ili.

Grandnombre enkonduki eksterlandajn kapitalojn povas esti rigardata kiel unu el la efikaj rimedoj por multaj grandaj ŝtataj entreprenoj, kiuj estas serĉantaj elirejon. Tiuflanke multe spertis la Nordĉinia Farmacia Fabriko, kiu estis fondita en la 50-aj jaroj. Ĝia vicestro Hong Shunyi konigis al ni, ke la Nordĉinia Farmacia Fabriko, kvankam enlande okupas la unuan lokon inter la samspecaj fabrikoj per sia granda vendokvanto de medikamentoj, tamen ne trovis sin inter la plej grandaj farmaciaj fabrikoj de la mondo. Pro eluziteco de instalaĵoj, multeco de laborantoj

kaj peza ŝarĝo por vivteni siajn emeritojn, la fabriko ne havis plu kapitalon por renovigi instalaĵojn kaj enkonduki teknikojn en produktadon. Ĝuste tiam Hebei-provinco komencis la laboron por grandnombre enkonduki eksterlandajn kapitalojn. La vicestro diris, ke la Nordĉinia Farmacia Fabriko mem estas enkondukitajo kaj konstruiĝis monhelpe de eks-Sovetunio. Kaj ĝi nun estas forta kaj fidinda kaj baldaŭ trovis kunlaboranton. Ĝi jam havas 5 novajn fabrikojn kune investitajn kaj kune administratajn. Precipe post kiam ĝi aĉetis penicilinan fabrikon de Germanio per kompensa komerco, ĝi eniris en la vicojn de la plej grandaj penicilinaj fabrikoj de la mondo.

En ĝiaj entreprenoj Welcome kaj Victor, kiuj najbaras kun komuna muro, ni iradis en la unua kaj dua etaĝoj kaj vidis multajn potojn grandajn kaj malgrandajn, sed tre malmultajn laboristojn. La vicestro daŭrigis, ke en la novaj fabrikoj la fiksita nombro de laboristaro estas serioze limigita. Tie la salajro estas pli alta ol tiu en la malnova fabriko kaj la laboro rigora. Kaj plie, tie la laboristoj ne povas kiel tiuj en la malnova fabriko ĝui malmultekostan loĝadon kaj senpagan kuracadon. Tamen ankoraŭ multaj volas labori tie, sed devas trapasi ekzamenon. Iu laboristo diris, ke li volas labori tie, ĉar tie la etoso de moderna entreprenoj estas sentebla kaj oni povas forte senti sin modernulo.

Jes, la kune investitaj entreprenoj de la Nordĉinia Farmacia Fabriko estas armitaj per plej avangardaj tekniko kaj administrado. Ili povas speguliĝi kiel modernaj entreprenoj. Same kiel la ekspluatejo de Shijiazhuang, la aliaj ĉu grandaj ĉu malgrandaj en Hebei-provinco donas senton de moderneco. Antaŭ 40 jaroj Shijiazhuang estis nur urbeto, sed nun ĝi jam fariĝis moderna urbo. Al kio oni ŝuldas ĉion ĉi? Estas multaj faktoroj, el kiuj unu sendube estas pordomalfermo. ■



Gardistaro de la ĉina nacia flago

En la momento de hiso de ĉina nacia flago

Fotoj de LIU SIGONG

Matene, kiam aperas aŭroro, miloj da homoj kolektiĝas sur Tian'anmen-placo de Pekino por atendi la momenton de hiso de ĉina nacia flago.

Kun la levigo de tamburado kaj muziko, gardistaro de la nacia flago marŝas per egalaj paŝoj trans ponteton super Jinshui-rivereto ĉe Tian'anmen-pordego kaj trans la larĝan Chang'an-straton kaj venas al blank-marmora teraso kun masto en la centro de la placo. La flago-tenanto metas grandan ĉinan nacian flagon sur hisilon. En akompano de la ĉina nacia himno ludata de la armea orkestro, la brila kvinstela nacia flago malrapide hisiĝas en la matenruĝo. Oni fiksas rigardon sur la leviganta flago, aŭskultante la muzikon.

Oni ne forgesos, ke en la 1-a de oktobro 1949 prezidanto Mao Zedong hisis tie la unuan kvinstelan ruĝan flagon de la nova Ĉinio. Ekde tiam la kvinstela ruĝa flago simbolas Ĉinion, dignon kaj fieron de la ĉina popolo. Ekde tiam sur Tian'anmen-placo ĉiutage iras solena flag-hisa ceremonio, kaj saluto al la flago en la ceremonio fariĝis grava afero por la ĉina popolo en la vivo. Multaj, malgraŭ longa vojaĝo, trajne veturas al Pekino por sperti la solenon.



Levigo de la flago

Rigardantoj



Voĉo por malpermeso de fumado

de ZHANG QINGZHEN

LAŭ raporto, iu cigareda kompanio ofertas la cigaredon kun marko "Morto". La marko montras teruran kracion de mortinto. La mastro de la kompanio malkaŝe diris: "Tio, kion ni vendas, estas nenio alia ol morto." Kvankam la diro estas senduba, kiel la vortoj "Fumado malutilas al sano" sur cigared-skatoloj de multaj landoj kaj regionoj, tamen tre malmultaj abstinis de fumado. Kaj la cigareda komerco ankoraŭ prosperas kiel antaŭe.

La Monda San-Organizo publikigis, ke ĉiujare en la mondo pli ol 2.5 milionoj da homoj mortas de fumado, t.e., en ĉiu 13-a sekundo unu homo mortas de malsano kaŭzita de fumado. La nombro de la mortintoj multe superas tiun de aideso, trafika akcidento, malsatego, milito kaj teroro.

Malgraŭ tio, fumantoj pli kaj pli multiĝas en la mondo. Laŭ statistiko, Ĉinio havas 350 milionojn da fumantoj. En la lastaj 5 jaroj la nombro de ĉinaj fumantoj kreskis je 2 procentoj. Oni fumas en multaj publikaj lokoj kaj trafikiloj, dum cigaredaj budoj vidiĝas ĉie en la urboj. Estas maltrankvilige, ke

fumas 30 milionoj da junulinoj. Sur stratoj iras fumantaj knaboj. 5 milionoj da 12-16-jaraj geknaboj fumas pro scivolemo kaj distremo.

En la 80-aj jaroj Ĉinio komencis propagandon por malpermeso de fumado. Influate de la publika opinio, pli kaj pli multaj komprenis, ke fumado malutilas al sano, sed kial fumantoj pli kaj pli multiĝas? Unue, la damaĝo de fumado ne estas tuj sentebla, nek atentata de la fumantoj. Kompreneble, malfacilas por ili ĉesi fumi. Pro tio la produktantoj de cigaredoj facile trovas merkaton; due, iuj eraraj opinioj pri fumado ne estas ĝustigitaj. Ekz., "fumado utilas al la nacia ekonomio". Iuj opinias, ke tabaka imposto estas granda enspezo de Ĉinio, kiu superis tiun de petrolo kaj kemia industrioj. Se malmultiĝos fumantoj, reduktiĝos la produktokvanto de tabako. Tio malhelpos la disvolviĝon de la nacia ekonomio. Tial, iuj regionoj rigardas la disvolvigon de tabaka industrio utila al la lando kaj popolo.

Antaŭe Ĉinio propagandis malpermeson de fumado ĉefe por la sano de sia popolo, sed malmulte por la interesoj de la nacia ekonomio, tiel ke la erara opinio "fu-

mado utilas al la nacia ekonomio" miskondukis nemalmultajn homojn.

Fakte, laŭ la informo el la Asocio de Fumado kaj Sano, la ekonomia perdo de Ĉinio kaŭzita de fumado de longe estas multe pli granda ol la imposto donita de tabaka industrio. Ekz., en 1994 la imposta enspezo de tabako en Ĉinio estis ĉ. 55 miliardoj da juanoj, sed la ekonomia perdo kaŭzita de fumado estis 65 miliardoj da juanoj kiel kompenso ĉefe por senpaga kuracado de diversaj malsanoj kaŭzitaj de fumado, perdo de incendio pro fumado, malpliigo de gren-produktokvanto pro granda areo kulturado de tabako k. a. Tiuj ĉi perdoj estas kaŭzitaj nur de fumado, sed en Ĉinio vivas pli ol 400 milionoj da nefumantoj atakataj de fumado, ankaŭ iuj el ili ne povas eviti malsanojn pro fumatako.

El la supre dirita videblas, ke tabaka komerco estas malprofitata por la ŝtato.

Tabako, unu el la plej teruraj epidemioj en la moderna socio, grave damaĝas la sanon, medion kaj riĉfontojn. Tabako entenas 40 kancerogenajn substancojn, 10

kancerogravigajn substancojn, nikotinon, karbonan monoksidon, plumbon, hidrargon k.a. Krom kancero, fumado kaŭzas ankaŭ kardiovaskulan sklerozon, stomakan ulceron, leŭkemion, katarakton kaj aliajn malsanojn.

Fumado kaŭzas al virinoj aborton, sterilecon, kanceron de utero cerviko, kormalsanon k.a. Ĝi pli grave damaĝas al geknaboj la sistemojn spiran, cirkulan, digestan kaj nervan.

Oni bone konas la malutilon de fumado kaj pli forte apelacias al la tuta socio por malpermeso de fumado. La 31-a de majo 1995 estis la 8-a Monda Senfuma Tago proponita de la Monda San-Organizo. Laŭ raporto, lastatempe, en iu lando pli kaj pli multaj fumantoj partoprenis en la tutlanda proceso kontraŭ la tabakaj entreprenoj, kiuj kaŝis, ke nikotino emigas al fumado, kaj tenis la entenon de nikotino, por ke la fumantoj havu la emon. La registaroj de iuj landoj preparas sin por malpermesi fumadon, ekz., laŭ difino, aĉeti cigaredojn estas kontraŭleĝa agado por la geknaboj en la aĝo de malpli ol 18 jaroj, kaj la cigaredaj komercistoj, kiuj malobservos tiun difinon, estos severe monpunitaj. En 1986 iuj aziaj landoj ekprenis nefumadon kiel regulon de la civitanoj kaj decidis, ke la lernejoj ne akceptu fumanto-lernantojn kaj oni nuligu la licencon de la fumantoj-ŝoforoj. Iuj landoj faris profundan kaj longtempan kontraŭfuman propagandon kaj levis landskale la tajdon por ĉesigi fumadon. Materialo montras, ke nun en la mondo la nombro de fumantoj malkreskas je 8 000 ĉiutage.

La registaro de Ĉinio, kiu havas la plej grandan nombron de fumantoj en la mondo, ĉiam donas grandan atenton al malpermeso de fumado. Aŭguste de 1997, okazos en Pekino la 10-a Monda Konferenco de Fumado kaj Sano, kio sendube akcelos la malpermeson de fumado en Ĉinio. Ekde 1979 la ĉina registaro plurfoje publikigis leĝon kaj regulon, traktis la damaĝon de fumado kaj alprenis rime-

dojn malpermesi fumadon. En la Leĝo pri Monopolo de Tabako de la Ĉina Popola Respubliko kaj Leĝo pri Protektado de Neadoltoj de la Ĉina Popola Respubliko, aprobitaj de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio en 1991, estas difinite, ke la ŝtato kaj socio plifortigos la propagandon pri damaĝo de fumado al la sano, malpermesos aŭ limigos fumadon en publikaj trafikiloj kaj lokoj kaj malpermesos fumadon al la element-kaj mezlernejoj. Ankaŭ en la Leĝo pri Reklamoj, aprobita de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio en oktobro 1994, estas difinite malpermesi reklami tabakon pere de komunikaj kanaloj kaj starigi afiŝojn de tabako en publikaj lokoj. Dank' al tio, oni povas profundigi, laŭ la

leĝoj, malpermeson de fumado en Ĉinio.

En la lastaj jaroj, diversanivelaj lokaj registaroj de Ĉinio starigis leĝojn pri malpermeso de fumado en publikaj lokoj. Post kiam Ŝanhajo la unua en Ĉinio ekpraktikis la leĝon malpermesi fumadon en la publikaj lokoj septembre de 1994, ankaŭ Wuhan, Suzhou kaj aliaj urboj ekhavis koncernan leĝon, kiu ludis gravan rolon por akceli la malpermeson de fumado en Ĉinio. La spertoj pruvis, ke tio estas komplika laboro. Krom perfektigi koncernajn leĝojn, necesas ankaŭ rimedoj de impostado, propagando kaj sanigo-edukado. Oni kredas, ke tio estos signifoplena laboro, ĉar sano estas grava por ĉiuj. ■

ABONTARIFO DE EPĈ POR 1995

Lando	Valuto	Abonprezo	Sendokosto	Totalo
Aŭstralio	AUD	19,00	16,00	35,00
Aŭstrio	ATS	192,00	128,00	320,00
Belgio	BEF	575,00	375,00	950,00
Britio	GBP	10,00	6,00	16,00
Germanio	DEM	28,00	18,00	46,00
Finnlando	FIM	61,00	50,00	111,00
Francio	FRF	88,00	62,00	150,00
Israelo	USD	14,00	12,00	26,00
Italio	ITL	20200,00	13800,00	34000,00
Japanio	JPY	1900,00	1600,00	3500,00
Kanado	CAD	17,00	15,00	32,00
Nederlando	NLG	28,00	23,00	51,00
Nov-Zelando	NZD	26,00	22,00	48,00
Svisio	CHF	23,00	17,00	40,00
Usono	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO A	USD	14,00	12,00	26,00
TARIFO B	USD			15,00
TARIFO C	USD			10,00
TARIFO A: Ĉiuj landoj en Eŭropo escepte de tiuj menciitaj en la kategorio TARIFO C.				
TARIFO B: Korea Respubliko, Singapuro, Hongkong, Turkio, Meksikio kaj ĉiuj landoj en Latin-Ameriko.				
TARIFO C: Ĉiuj landoj de Orienta Eŭropo (inkluzive de Estonio, Latvio, Litovio, Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj kaj eks-Jugoslavio) kaj ĉiuj ceteraj landoj en Azio kaj Afriko ne menciitaj supre.				
Rim. Por aerpoŝta sendo bonvolu aldoni 10,00 usonajn dolarojn.				

Vivo de semokulturisto

KAMPARANO Xu Caizhi, bruna kaj maldika, elkulturis en 25 jaroj novajn speciojn de tritiko, kiaj Tritiko 7405, Granda Grajno 783 kaj Frumaturiĝa Tritiko 781. Sekve de tio, la hektara produktokvanto de tritiko kreskis de 6 000 kg al 7 500 kg. Kaj li famiĝis kiel sperta kulturisto de tritika semo.

Xu Caizhi loĝas en la vilaĝo Erlitou de la urbo Yanshi, Henan, Ĉinio. Tie estas la ruino de la plej frua Erlitou-kulturo de Ĉinio. De la antikveco la loko estas konata kiel grena regiono de Ĉinio. Tamen, ĝis kiam Xu Caizhi finis sian lernadon en mezlernejo, la tieaj loĝantoj vivis fundamente de la ĉielo. Post rikolto oni muelis tritikon kaj konservis la farunon por manĝi en festotagoj. “Kial ne manĝi farunaĵon ĉiutage?” Kiel li deziris manĝi farunaĵon ĉiutage! De la infaneco li rigardis tion sia plej alta deziro.

Neatendite, la deziro decidis lian vivovoĵon — elkulturi plej bonan specion de tritiko kaj grandamplekse plialtigi la produktokvanton. Por tiu celo li dediĉis siajn 25 jarojn.

En la tombejo ĉe la vilaĝo staras unusola kabano el branĉoj kaj adoboj, konstruita de la 17-jara Xu Caizhi kaj liaj kamaradoj. Iliaj eksperimentaj kampoj sterniĝis inter tomboj. Rememorante la pasintaĵojn, li diris: “En profunda nokto mi ankoraŭ faris provadon en la kabano, skribis referaĵojn pri semo

kaj observis tritikan kampon kun timemo.”

Xu Caizhi havis multe da ŝancoj labori aliloke kaj liaj kamaradoj jam ne laboris en la kabano. Sed li ankoraŭ okupiĝis pri semkulturado. Oni demandis lin kun nekomprenemo: “Kial vi ne okupiĝas pri laboro malpli peniga kaj pli profitodona?” Li respondis: “Semkulturado estas diferenca de aliaj laboroj. Por ricevi plej bonan specion de semo necesas multjara provado.”

Li kulturis tritikajn semojn jaro post jaro. Por posedi kutiman kulturadon de semo per seksa hibridi-

go li absorbiĝis en legado. Li preferis praktikadon. Somere, sub la suno li observis sinsekvajn horojn, eĉ ĝis kapturniĝo. Vintre li delokis glaciĝintan tertavolon por pririgardi la branĉigon kaj kreskadon de tritikaj plantidoj. Krome, li ankaŭ mezuris la longecon de tritika plantido kaj faris detalan noton. Li bone sciis, ke semkulturado estas scienco, kaj ke por bone fari semkulturadon necesas por li koni la karakteron de ĉiuspecia tritiko. En ventego kaj pluvego li alkuris tritikan kampon por sciigi pri obstineco de la tritiko. En 1975 lin trafis anemio. Malgraŭ tutkorpa doloro, li polenis tritikon kaj sven-

S-ro Xu Caizhi (maldekstre) kaj la aŭtoro



Lastatempe ni kontaktis Komercon Ĉambron de Malago kaj havigis al ĝi raporteton pri entreprenoj (kaj ties agado) situantaj en Ĉinio, Ĉeĥio, Ukraino, Madagaskaro k.a. Nia celo estas havigi al la hispanoj la plej akuratajn kaj fidindajn informojn (Esperante kaj hispane) pri alilandaj komercaj, industriaj k.a. firmaoj.

Kompreneble, nia asocio (AEU) nur aktivas por nia internacia lingvo. Tamen, kaj ĝuste pro tio, ĝi iniciatas kaj plenumas ekstermovadajn agadojn, kiel ĉi tiun, favorajn al la rekono kaj aplikado de Esperanto fare de neesperantistoj. Ni estas certaj, ke de tio dependas grandparte ĝia estonto. Tial ni petegas alilandajn samideanojn, ke ili kolektu la plej interesajn informojn pri la agado de entreprenoj funkciantaj je internacia nivelo en siaj respondaj landoj kaj sendu ilin al:

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
(Asociación Andaluza de Esperanto)
Poŝtkesto 864
E-29080 MALAGA
Hispanio

Ni publikigos ilin senpage en nia trimonata revuo GAZETO ANDALUZIA kaj, ili ankaŭ senpage estos havigataj al Komerca Ĉambro de Malago (Hispanio) por ke ĝi aperigu ilin en sia perioda publikaĵo PROMOCION DE COMERCIO EXTERIOR, OFERTAS Y DEMANDAS DE PRODUCTOS (Iniciato de Ekstera Komercio, Ofertoj kaj Demandoj de Produktoj).

is en la tritika kampo. En 1984 li rompĉis al si piedfingron kaj enhospitaliĝis. Por ne interrompi la observadon de tritiko li petis de sia edzino ŝtele veturigi lin el la hospitalo al la kampo. En 1978, kiam venis la tempo hibride kulturi semojn de tritiko, li estis multe okupata eĉ ne havante tempon por manĝi. Neatendite, ĝuste tiam lia filo grave malsaniĝis. Li pensis, ke tio prokrastos polenadon de tritiko, se li portos sian filon al la gubernia hospitalo, kaj forvaporigos la tutjaran penadon. Sekve de tio, li preĝis pro la filo, polenante tritikon. Polenado de spiko da tritiko bezonis 1-2 horojn. Kiam li eliris el la tritika kampo kaj pretis porti sian filon al la hospitalo, lia filo jam mortis. Portante la filon en la brakoj, li lamentis. Je la momento al lia kapo venis la ideo forlasi semkulturado.

Fakte lia vivo estis nedisigebla de tritiko kaj semkulturado, ĉar lia kapo estis plena de la aferoj pri tritiko. Kiam oni demandis al li, en kiu klaso lernas lia filo, li ridetis longe sen respondo. Sed, kiam oni demandis pri tritiko, li certe res-

pondis multe. Ekz., kiom ĝi altas? Kiom larĝas la folio? Kiam ĝi maturiĝas? Kiom da grajnoj havas ĉiu spiko? Kiel kreskas hibridigita tritiko kaj ĝia ido? Ĉio ĉi estas gravurita en lia memoro. Ĝuste pro tio li denove absorbiĝis en semkulturado, post kiam li forlasis la bedaŭron pri la morto de la filo.

Tiujare li sukcese elkulturis la Frumaturiĝan Tritikon 781, kiu karakteriziĝas per rezisto kontraŭ malsano kaj flankenfalo kaj aparte adaptiĝas al la klimato en centra Ĉinio. Siatempe multaj ne kredis, ke kamparanoj, kia Xu Caizhi, povas elkulturi bonspecian tritikon. Kiam li portis la semon al la provinca ĉefurbo Zhengzhou por provkulturi ĝin, oni lin rifuzis. La honesta Xu ekkoleris kaj disputis kun la fakuloj. Poste, la Frumaturiĝa Tritiko 781 donis la plej altan produktokvanton inter la 17 elektitaj specioj de tritiko. En 1991 la Frumaturiĝa Tritiko 781 ricevis la nomon Henan-tritiko 18 kaj s-ro Xu Caizhi estis honorita per la titolo de ŝtatnivela specialisto pro elstara kontribuo.

Nun li disponas hektaron da

modela kampo de tritiko kaj per tio servas speciale al la tritikaj regionoj de Ĉinio. Sur tiu kampo kreskas 23 specioj de tritiko. En ĝi oni povas elekti specion plej taŭgan por ilia propra loko. Henan-tritiko 18 kreskis sur pli ol du milionoj da hektaroj de Ĉinio. S-ro Li Changchun, estro de la provinco Henan, havas 670 hektarojn da modelaj kampoj de Henan-tritiko 18 por gvidi la laboron tiurilate en la provinco.

S-ro Xu Caizhi ne kontentas pri la akiritaj sukcesoj kaj komencis esplori novan specion. Li diris, ke plejparto de la kulturitaj specioj estas multe produktivaj, sed ne bonkvalitaj. Li elkulturis la novan specion Duokang-tritiko 893, produktivan kaj bonkvalitan. Nun li sukcesis kulturi ĝin en malgranda areo. En lia eksperimenta kampo sane kreskis tritiko kun dikaj grajnoj. Li koniĝis, ke la hektara produktokvanto de Duokang-tritiko 893 superos 10 500 kg kaj la proteina enteno en ĝi 17.3%. Se ĝi estos kulturata grandaree, la bonkvalita faruno, bezonata de la ĉina manĝaj-industrio, ne estos plu importita. ■

“Rekonstruo” de homoj

La esenca diferenco inter homoj kaj bestoj estas en tio, ke la homoj povas pensi, paroli, labori kaj krei. Ĉio ĉi estiĝis de la disponado de la altklasaj nervaj sistemoj kun la cerebra kortekso kiel la ĉefa. Se la altklasaj nervaj sistemoj difektiĝos, perdiĝos do la esenco de la homo.

EN ambulatorio de la nerv-psikologia kaj konvaleska centro de la Ĉina-Japana Amikeca Hospitalo mi vidis tragediojn de la homa vivo unu post alia.

“Wang Qi, diru ‘a!’” afable alparolis kuracistino mezaĝan pacienton, tamen tiu ĉi kun malfermita buŝo povis elparoli nenion. “Rigardu,” diris d-ro Yin Wengang, almontrante al la maldekstra kranio de Wang Qi, kie vidiĝas kava cikatro en grandeco de pugno. La doktoro daŭrigis: “Li laboris kiel vilaĝa instruisto. Antaŭ tri monatoj li falis de la loko 2 metrojn alta kaj vundis al si la cerebran kortekson, kiu komandas parolon...”

“Lin Kewen, kiom da jaroj vi havas?” “Ne.” “Kiujn havas via familio?” “Jes.” Lin Kewen, 41-jara, estis sagaca policoficisto, sed cerba trombo konfuzis liajn pensojn.

“S-ro Li, kiam aperos sur la ekrano verda signalo, bonvolu tuj premi la verdan klavon.” Sed tiu 62-jara maljunulo, iama diplomato, apatie sidis antaŭ la ekzamena aparato. Antaŭ dek jaroj lin atakis cerbovaskula malsano. Pro sia malvigla pensado li rifuzis kontakti kun aliaj, kio rapidigis al li la cerban atrofion, kaj

fine li fariĝis demenculo.

“Rigardu lin,” fingre almontrante al junulo sur rulseĝo, kuracistino Xie Yuxiao, 35-jara, diris al mi: “Diplomitiginte el universitato, li laboris kiel asistanto de ĝenerala direktoro de iu asecura kompanio. Li paralizigis de trafika akcidento, kaj lia novedzino forlasis lin...”

“Ho, malfeliĉe! Vere kompatinde!” Ŝi daŭrigis: “Ĉinio estas lando alte taksanta familian kompletecon. Ĝenerale dirite, la plejaĝulo estas ĉefo de la familio kaj la edzo — ĝia subtenilo. Bedaŭrinde, familioj de tiuj malsanuloj jam estas disrompitaj... La forlasitaj idiotaj infanoj kaj la paralizitaj demenculoj plenaj de litulceroj vivas malpli bone ol bestoj. Eĉ bestoj povas mem serĉi nutraĵojn. Kvankam la sociaj bonstatigejoj prizorgas ilin, tamen tie ili povas nur daŭrigi sian sensignifan vivon. Tial, por radikale ŝanĝi ilian sorton, estas necese redoni al ili altklasan nervan funkcion...”

“Ĉu tio eblas?” mi tuj interesiĝis pri la parolo.

“Ni jam komencis la esplordon. Tio estas tute nova kampo, kaj monto da malfaciloj estas en la studo, kiu estas tamen signifa.”

Mi komprenis, kial juna faku-


lo Yin Wengang, kiu studis en la Universitato de Londono ok jarojn kaj tie akiris doktorecon pri nerva psikologio kaj oficon de esploristo, decideme revenis al sia patrio. “Mi volas fari ion utilan por la popolanoj,” diris li.

Ni venis al 16-jara knabino Rongrong. “Saluton, onklino!” ŝi laŭte salutis min sugestate de trejnisto. Poste ŝi denove klinis sian kapon por voĉlegi la vortojn sur paperslipoj: “Monto, rivero, suno, luno, homo...”

“Ŝi havas nur hemisferon,” Yin Wengang eksplikis. “Oni fortranĉis al ŝi la maldekstran hemisferon pro epilepsio antaŭ 6 jaroj...” “Sed, kial ŝi povas paroli?” “Antaŭ du monatoj, kiam ŝi enhospitaliĝis, ŝi ne povis paroli. Necesas do krei novan parolsistemon por ŝi, t.e. per trejnado substitui la funkcion de la dekstra hemisfero al tiu de la maldekstra. Eksterlande oni faris tian esplordon. Oni ĝenerale opiniis, ke substituiĝo inter la dekstra kaj maldekstra hemisferoj estas sufiĉe limigita, precipe tiu de la dekstra al la parol-kapablo. Tamen ni trovis en klinikaj kazoj, ke la restinta dekstra hemisfero povas ne nur esti revivigita por substituiĝi al la perdita funkcio, sed ankaŭ bone plenumi la substituiĝon, la ŝlosilo kuŝas en ŝanco-kaptado. Ĉe ni estas ankaŭ paciento, kiu perdis sian maldekstran hemisferon, jam ellernis kompleksan operacion. Pri tio ankoraŭ ne estas raporto en la medicina rondo. Kiom granda estas la latentata povo de la homa cerbo, tio ankoraŭ estas studinda problemoj.”

Mi tre deziris scii ilian trejnan metodon.

“Ne estas fiksa metodo,” diris Yin Wengang. Ĉar la kaŭzo, pozicio kaj graveco de la difektitata cerbo estas diferencaj. Necesas fari ĝustan juĝon pri la nerva psiko kaj poste ellabori plej bonan trejnan planon. Jen diferenco inter nia kaj aliaj konvaleskejoj.



D-ro Yin Wengang direktas pacienton en ekzercado de liaj manoj.

En la korposanigejo paralizuloj trejnas siajn artikojn en starado, irado, kaŭrado, kuŝado k.a. En ekzercejo oni ekzercas siajn suprajn membrojn per delikataj movoj kaj rekonan povon por rehavigi al si la kapablon aranĝi sian propran vivon. En la lingva halo afaziuloj faras alian trejniĝon... Por ke la pacientoj aktive partoprenu en la trejnado, la trejnado devas esti kaj interesa kaj proksima al la vivo. Ekz. kripluloj je membroj ludas halmon. Tio estas utila ne nur al la fingrartika funkcio de pinĉado, sed ankaŭ al vigligo de ilia pensado. Afaziuloj interkomunikigas per telefono aŭ raportas per mikrofono. En ridado la animstato de la suferantoj estas reguligata, kvazaŭ ili denove vivus la vivon de sanaj homoj. Tio estas bezonata de la konvalesko.

Du monatojn poste mi refoje venis al la konvaleska centro. “Kiel statas Wang Qi?” mi demandis kuracistinon Xie. “Nun li povas voki multajn nomojn, antaŭe neniun.” Tiam venis mez-

“Ha, kia brila sukceso! Ne fieru, s-ro Li.” Xie ŝercis kun la maljunulo kaj tiu silentis kun rideto. “Neniel havigu al ili la senton de malsukceso.” Xie diris, ke la maljunulo rifuzis viziti kuraciston antaŭe, sed nun viziti la centron fariĝis lia gaja afero.

En la centro la vivo ne estas tragedio, aŭ ne nur tragedio. Ŝajne la sorto de Feifei pli bone atestas tion. Kuracisto Xie, profitante de la ŝanco, rakontis al mi pri la ĵusa okazintaĵo.

Malpli-ol-4-jara knabo Feifei falis de la tria etaĝo, kaj pro tio grave vundiĝis lia kapo, sed li estis savita. Li ne povis moviĝi nek paroli. Antaŭ duonmonato li ricevis kuracadon en la centro.

“Kiel li statas?”

“Ho, tre aminda, tre vigla! Li povas voĉlegi poemojn kaj popol-kantojn. Li venos trejniĝi posttagmeze.”

“Mirinde! Ĉu estas intensigita la trejnado?”

aĝolino. Ŝi diris al Xie: “Doktoro, bonvolu konsili al mia frato. Li estas malpacienca por reveni hejmen, dirante, ke estas multe da laboroj por fari. Li estas nur 41-jara, ankoraŭ juna...” Xie ĝoje ridis. Mi supozis, ke tiu estas fratino de Lin Kewen. Ankaŭ s-ro Li estas tie. Li senĉese premas klavojn konforme al la signaloj sur la ekrano.

“Ne. Ju pli aktive, des pli bone, tio ne konformas al la principo de trejnado de membroj. Kiu ne povas rampi nek stari, tiu fariĝas anomalia. Se li senzorge lernas iradon, estas malfacile fari reĝustigon. Tial, fakuloj faris sciencan juĝon pri la funkcio de Feifei kaj difinis por li plej konvenan gradon de trejnado. Feifei komencis sian trejniĝon per rampado... Feifei suferas ankaŭ de ‘maldekstra ignoreco’ malfacile kuracebla. Li povas stumbli sur maldekstra obstaklo kaj ne scias eviti maldekstran veturilon... D-ino Ao Chunli forigis lian malsanon en ludo.”

D-ino Ao Chunli estis donanta lecionon al infano-afaziulo. La infano tendencis al enfermiĝemo. Li plorante rifuzis ĉiun admonon. Sur nazpinto de Ao aperis ŝvito. “Ĉu tre laciga estas via laboro?” Ŝi kapjesis, dirante, ke iam ŝi devis ripetadi dekmil fojojn da ekzemplo por reĝustigi unu prononcon al paciento. Pro tro multa parolado ŝi ofte suferas de kapturigo. “Tamen mi ŝatas tiun laboron, ĉar ĝi estas kreiva,” diris Ao. Ŝi metis kolorajn bildojn kaj interesajn ludilojn ĉe la maldekstran flankon de Feifei kaj atentigis lin foje refoje. Finfine Feifei ne plu malatentis la maldekstran flankon. Por ke la manoj de Feifei ne plu tremetu, ŝi desegnis bananojn, pomojn kaj pirojn kaj petis la infanon kolorigi ilin. Feifei ekkolorigis ilin kun granda intereso. Ŝi desegnis por Feifei grandan kukon kaj ludis kune kun li. Ĝuste tiu kuko elvokis de li la unuan vorton kaj unuan frazon: “Donu... ĝin... al... panjo...” La patrino larmis kaj same la trejnistino. Ekde tiu momento la vivo de Feifei fariĝis enhavoriĉa.

Posttagmeze en la koridoro aŭdiĝis laŭta infana voĉo: “Mi denove venis al la konvaleska centro.” Poste sonoraj ridoj... Kaj ĉiuj fakuloj, doktoroj kaj trejnistoj de la centro kun rideto aŭskultis la voĉojn ĉiam proksimiĝantajn — la kanton de la vivo kune kreitan de ili. ■

Originalaj lingvoj de ĉinaj nacimalplimulto

de GUO MIN

INTER la 55 ĉinaj nacimalplimulto, krom hujoj, kiuj uzas han-lingvon de longa tempo, kaj manĉuroj, kiuj ekuzis han-lingvon en la moderna epoko, la ceteraj 53 nacioj havas ĉiusian propran lingvon kaj plejparto de la nacimalplimultanoj interkomunikiĝas per sia nacia lingvo. Parolaj kaj skribaj lingvoj de la ĉinaj nacimalplimulto havas longan historion. Kharosti enkondukiĝis en Ĉinion jam antaŭ Kristo. En Ĉinio konserviĝas epigrafo en la sogdiana lingvo de la 2-3-a jc. kaj dokumentoj en janĉi- kaj ĉiŭci-lingvoj faritaj en la 5-a jc. Jioj, loĝantaj en sudokcidenta Ĉinio, ekuzis sian nacian lingvon almenaŭ en Handinastio (206 a.K.-220 p.K.). La lingvoj tibeta, taja, dongba-a, tuĝjue-a, hujhu-a, jutjan-a, ŝjiŝja-a, njuĝen-a, ĉjidan-a kaj basba-a jam havas historion de ĉ. mil jaroj, kaj eĉ la manĉura lingvo havas historion de 400 jaroj. En la historio estis proksimume 30 antikvaj skriblingvoj de ĉinaj nacimalplimulto kaj nenombreblaj dokumentoj kaj materialoj en nacimalplimultaj lingvoj, kaj iuj el ili estas valoraj.

La lingvoj de ĉinaj nacimalplimulto havas ĉiusian originalan trajton. Ekz., la ji-a lingvo, kiel originala nacia lingvo, havas neniun rilaton kun aliaj lingvoj. La dongba-a lingvo de naŝi-nacio, kiu interesis ĉinajn kaj alilandajn fakulojn, estas bone konservata hieroglifo karakterizita per bildaj figuroj. Ĝi, viva hieroglifo ekzistanta nun, estas tre rara en la mondo. Estas aparta virina lingvo, kiu havas sian propran sistemon kaj estas legebla ekskluzive por virinoj en la regiono de Shangjiangyu de Hunan-provinco.

De la 50-aj jaroj, observante la principon pri egalrajteco de ĉiuj nacioj, la ĉina registaro ellaboris serion da politikoj kaj leĝoj pri naciaj skriblingvoj kaj realigas ilin.

Sur la ĉina monbileto *Renminbi* estas legebla ne nur la komune uzata han-lingvo, sed ankaŭ la lingvoj mongola, tibeta, ujugura kaj ĝuanga. Dum la sesioj de la Tutlanda Popola Kongreso, la superaj aŭtoritatoj de la Ĉina Popola Respubliko, oni parolas en han-lingvo kaj donas similtanan interpretadon en la lingvoj mongola, tibeta, ujugura, kazaĥa, korea, jia kaj ĝuanga. La kongresaj dokumentoj kaj materialoj estas presitaj ankaŭ en tiuj naciaj lingvoj.

En multaj aŭtonomaj regionoj de nacimalplimulto gravaj dokumentoj, leĝoj, statutoj kaj administraj regularoj de la centra registaro estas presitaj en la lingvoj hana kaj nacimalplimultaj. En iuj aŭtonomaj lokoj de nacimalplimulto la civitanoj rajtas fari proceson en sia nacia lingvo, kaj la justico publikigas verdikton, dekretan kaj aliajn dokumentojn en unu aŭ pluraj naciaj lingvoj ĝenerale uzataj en la loko.

Ekz., en la multnacia Xinjiang la ujuguroj, kazaĥoj, kirgizoj, mongoloj, ŝibooj kaj rusoj havas ĉiusian propran parol- kaj skrib-lingvojn. En la pasintaj pli ol 40 jaroj, por garantii al la diversaj nacioj uzi kaj disvolvi sian lingvon, la popola registaro de la Xinjiang-a Ujugura Aŭtonoma Regiono alprenis multe da efikaj rimedoj: Unue, garantii al la aŭtonomaj instancoj uzi unu aŭ plurajn lingvojn ĝenerale uzatajn en la loko, por plenumi sian oficon. En la aŭtonoma regiono oni ĉiam uzas la lingvojn ujuguran kaj hanan, kaj en la aŭtonomaj subregionoj kaj gubernioj — la lingvon de la koncerna nacimalplimulto kaj han-lingvon, dum la sesioj de ĉiuj popolaj kongresoj de la aŭtonoma regiono oni uzas la lingvojn ujuguran, hanan, kazaĥan, mongolan kaj kirgizan. La oficialaj dokumentoj, sigeliloj, ŝildoj kaj markoj de diversaj komercaĵoj en la aŭtonoma regiono devas esti skribitaj en la lingvoj ujugura kaj hana. Dum sia juĝado kaj verdiktado la regiona justico, laŭ la nacieco de la procesanto, uzas unu aŭ plurajn lingvojn ĝenerale uzatajn en la loko. Due, doni grandan atenton al disvolvo de la nacilingvaj aferoj novaĵa, eldona, radiodisaŭdiga, televida kaj filma, ekz., la ĵurnalo "Xinjiang Ribao" estas presita en la lingvoj ujugura, hana, kazaĥa kaj mongola. La Popola Eldonejo kaj Eduka Eldonejo de Xinjiang funkciigas redakcion de 6 lingvoj: ujugura, hana, kazaĥa, mongola, kirgiza kaj ŝiboa, kaj eldonas librojn, gazetojn kaj lernolibrojn en la 6 lingvoj respektive; la Popola Radio de Xinjiang elsendas programerojn en la ujugura, hana, kazaĥa, mongola kaj kirgiza lingvoj; la tri frekvencaj kanaloj de la Xinjiang-a Televido elsendas en la ujugura, hana kaj kazaĥa lingvoj, la televidstacioj kaj radiostacioj de la aŭtonoma regiono plejparte elsendas almenaŭ en du lingvoj. La Tianshan-a Studio kaj Xinjiang-a Televido produktis kaj dublis multe da nacimalplimult-lingvaj filmoj kaj televidaj teatraĵoj



Libroj en nacimalplimultaj lingvoj

en la lastaj jaroj. Trie, instrui en sia nacia lingvo.

En 1949, kiam fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, la uĝuroj, tibetanoj, mongoloj, kazahoj, koreoj, ŝibooj, tajoj, uzbekoj, tataroj, rusoj, ĵioj, naŝioj, mjaŭoj, ĝingpooj, lisuoj, lahuoj kaj vaoj havis ĉiu sian nacian lingvon, i.a. la lastaj 7 lingvoj ne estas ĝenerale uzataj nek normalaj.

Komence de la 50-aj jaroj, laŭ la instrukcio de la centra registaro, ke oni helpu la nacimalplimultojn, ne havantaj sian propran lingvon aŭ ĝenerale uzatan lingvon, en kreo de lingvo, kaj ke oni helpu la nacimalplimultojn, postulantajn reformi sian lingvon. En reformo de ilia lingvo 11 nacimalplimulto kreis 15 alfabetajn lingvojn, t.e. la lingvoj ĝŭanga, buĵia, 4 mjaŭaj, ĵia, lia, naŝia, lisua, 2 haniaj, donga, vaa kaj zaivaa. Samtempe, oni helpis uĝurojn kaj kazahojn en reformo de iliaj lingvoj, helpis tajojn, lahuojn kaj ĝingpoojn en raciigo de iliaj lingvoj. Kaj ankaŭ estas iuj nacioj, kiuj memvole elektas han-lingvon aŭ lingvojn de aliaj nacioj.

La nove kreitaj lingvoj, krom li-lingvo, ĉiuj aliaj estis praktikataj, i.a. ĝŭang-lingvo estis sankciita en la 50-aj jaroj kiel oficiale uzata lingvo.

La reformitaj kaj raciigitaj lingvoj, krom taj-lingvo de Dehong, la lahua kaj ĝingpoa lingvoj akceptitaj kaj nun daŭre uzataj, la ceteraj ne estis akceptitaj de la lokanoj. Tio ankaŭ montris, ke la volo de nacimalplimulto estas respektata.

La praktikado kaj disvastigado por la nove kreitaj, reformitaj kaj raciigitaj lingvoj estis farataj ĉefe en instruado en la du lingvoj hana kaj nacimalplimulta en elementaj lernejoj, en eliminado de analfabeteco por plenkreskuloj, en eldonado, radiodisaŭdigo, filmado kaj televido kaj rikoltis rimarkindajn sukcesojn.

La registaro fondis iujn fakojn pri naciaj lingvoj, por ke la nacilingva laboro iru normale kaj glate. En la Ŝtata Komisiono pri Nacimalplimultaj Aferoj sub la Ŝtata Konsilantaro funkcias nacilingva oficejo. En la Xinĵiang-a Uĝura Aŭtonoma Regiono, Tibeta Aŭtonoma Regiono, Interna Mongolio, Guangxi-a Ĝŭang-nacia Aŭtonoma Regiono, Yunnan-provinco kaj Sichuan-provinco funkcias laborkomisiono pri nacimalplimultaj lingvoj. En la provincoj Qinghai,

Heilongĵiang, Jilin, Liaoning, Guizhou kaj Hunan laboras oficejo de nacimalplimultaj lingvoj. Nun funkcias ankaŭ iuj transprovincaj kunlaboraj organizoj pri nacilingva laboro.

Tiuj establoj rikoltis rimarkindajn sukcesojn en efektivigo de la ŝtataj politikoj pri naciaj lingvoj, en ilia leĝa konstruado, normigo, normaligo kaj informo-traktado de nacimalplimultaj lingvoj, en akcelado de la aferoj traduka, eldona, eduka, novaĵa, radio-disaŭdiga, filma kaj televida kaj ordigado de antikvaj literaturoj, en akademia esplorado, kunlaborado, interkomunikado kaj kulturado de fakuloj per nacimalplimultaj lingvoj kaj en reciproka lernado de lingvoj inter la nacioj.

Ekde la fino de la 70-aj jaroj, kiam Ĉinio ekpraktikis la politikon de reformado kaj pordomalfermo, la naci-lingva laboro akiris novajn sukcesojn.

La eduka afero de naciaj lingvoj rapide disvolviĝis. En la nacimalplimultaj regionoj, kie oni uzas la tradicie uzatan lingvon, kiaj Xinĵiang, Interna Mongolio kaj Yanbian, jam formiĝis relative kompleta nacia eduka sistemo. En tiuj regionoj la lernejoj aŭ fakoj, kiuj ĉefe varbas nacimalplimultajn lernantojn, uzas lernolibrojn en sia nacia lingvo kaj la lingvon en instruado kaj elkulturis grandan nombron da diversaj fakuloj bezonataj de la loka konstruado. Instruado en la lingvoj hana kaj la nacimalplimulta estas farata en rudimenta skalo en iuj nacimalplimultaj regionoj. Tiu praktikado rikoltis sukcesojn en propedeŭtiko de infanoj kaj elementa edukado. Ekz., en la regionoj, kie praktikigas du-lingva instruado, rimarkinte pliiĝis la nombro de lernoagaj lernantoj. Ili, ĝenerale dirite, povas daŭrigi sian lernadon en kompare longa tempo. La du-lingva instruado ankaŭ montris sian superecon en eliminado de analfabeteco. Ekz., en 1980 Sichuan ekuzis la ĵi-an lingvon, kaj nun en 8 gubernioj jam ne estas junaj kaj plenkreskaj analfabetaj jinoj.

Nun en Ĉinio estas 32 eldonejoj de nacimalplimultaj lingvoj. Ili tradukis kaj eldonis multe da gravaj literaturoj, soci-sciencaj kaj natursciencaj libroj kaj popularaj sciencaj legaĵoj, ordigis kaj eldonis grandan nombron da nacimalplimultaj antikvaj libroj. Sole en 1993 Ĉinio eldonis 3 500 specojn da libroj en pli ol 20 naciaj lingvoj.

La novaĵa, radioelsenda, filma kaj televida aferoj en nacimalplimultaj lingvoj rapide disvolviĝis. En 1993 la diversnaciaj regionoj de la lando eldonis 173 gazetojn en 17 lingvoj. La Centra Popola Radiostacio de Ĉinio kaj la 30 provincaj kaj regionaj radiostacioj elsendas en 16 lingvoj, la radiostacioj subprovincaj kaj guberniaj elsendas en pli ol 20 lokaj naciaj lingvoj. En 1993 oni produktis 3 401 rakontajn filmojn en naciaj lingvoj, 10 430 dublitajn filmojn, kiujn rigardis 464 865 200 homoj.

Oni atingis ĝojigajn sukcesojn ankaŭ en normaligo kaj informigo de la nacimalplimultaj lingvoj. Iuj el ili jam povas esti traktataj per komputero. En Ĉinio tiu laboro iras al nova jarcento. ■

BING CHUAN:

Nova industria urbo Xiangfan



Produktaj de Dongli-kompanio transportataj aliloken

XIANGFAN en la meza baseno de Yangzi-rivero estas la dua granda urbo de Hubei-provinco. Ĝi estas fama urbo kun historio de pli ol 2 800 jaroj, kaj ankaŭ nova industria urbo.

Decembre de 1990 en Parizo estis subskribita la kontrakto pri produktado de 300 mil personaŭtoj kune investita de Ĉinio kaj Francio. Ĝi estis la plej granda projekto en la aŭta industrio de Ĉinio siatempe. La ĉina registaro decidis, ke la projekto plenumiĝos samtempe en Wuhan kaj Xiangfan, bazo de la Dongfeng-a Aŭta Kompanio: En Xiangfan estos konstruita maŝinfabrika, en kiu produktiĝos motoroj, rapidŝanĝiloj, ĉasioj kaj aliaj partoj de aŭto, kiuj muntiĝos en Wuhan.

Surbaze de la programo pri 500-kilometra zono de aŭta industrio, kie troviĝas la urboj Shiyang, Xiangfan kaj Wuhan, Xiangfan difinis la celon de sia disvolviĝo: starigi ekspluatitan regionon de aŭta industrio kun apartaj trajtoj. Poste, 46 entreprenoj de aŭta industrio aliĝis al la Aŭta Grupo de Dongfeng.

EKSPLUATA REGIONO KUN APARTAJ TRAJTOJ


La ekonomia kaj teknika ekspluatita regiono de aŭta industrio en Xiangfan sidas je tri kilometroj nordoriente de la urboparto de Xiangfan, kun areo de 48 kvadrataj kilometroj. Tie estas la bazo de la Dongfeng-a Aŭta Kompanio, la Xiangbei-a Fervoja Klasifikejo kaj aliaj entreprenoj grandaj kaj mezgrandaj. Kiam la ĉina registaro komencis turni sian ĉefan investon por la Dongfeng-a Aŭta Kompanio en montaro al Xiangfan, Xiangfan-anoj kaptis la ŝancon kaj prezentis la sloganon: "Dependi de la bazo de la Dongfeng-a Aŭta Kompanio, preni aŭtan industrion kiel la ĉefan kaj disvolviĝi en servo kaj kompletigo."

Por plibonigi la investan medion la Xiangfan-a Elektrolivera Buroo, Dongfeng-a Aŭta Kompanio kaj Shenlong-a Aŭta Kompanio kune konstruis transformatoran substacion kun tri lineoj, kiu havas elektroliveran kapaciton de 107 mil kilovoltamperoj kaj garantias liveron de elektro al produktado kaj konstruado en la regiono; la Xiangfan-a Akvolivera Administracio enterigis akvoliveran tubon kun kalibro de 600 milimetroj, kiu kondukas akvon al la regiono. Kun la akvolivera sistemo de la Dongfeng-a Aŭta Kompanio, la taga akvolivera povo atingis 26 mil tunojn, kio fundamente kontentigis la bezonon de akvo en produktado kaj en la vivo; la Xiangfan-a Poŝta kaj Telekomunika Administracio konstruis en ĝi telekomunan domegon kaj unuaperiodan program-regatan telefonon kun 5 000 lineoj; la Xiangfan-a Trafika Administracio investis 28 milionojn da janoj por konstrui duaklasan ŝoseon kun larĝo de 20 metroj inter la urbocentro kaj la regiono. Kaj krome, ekfunkciis ankaŭ la aŭta komerca centro, briksfabrika, privata ekonomia urbo, restoracio, produktaĵo de legomoj kaj aliaj.

Je la fino de 1994 la fiksa kapitalo de la projekto atingis ĉirkaŭ kvin miliardojn da janoj, la totala investo 2.3 miliardojn da janoj kaj la totala industria produktovalor 2.32 miliardojn da janoj. Julie de 1995, la Fabriko de Leĝeraj Aŭtoj komencis produktadon kaj laŭplane produktos 3 000 aŭtojn en la kuranta jaro. Kaj la maŝinfabrika de Xiangfan jam ricevis investon de pli ol miliardo da janoj kaj laŭplane ekproduktos en la dua parto de la venonta jaro.

KAPTI ŜANCON DISVOLVI SIN

La Dongfeng-a Aŭta Kompanio donas atenton ne nur al sia disvolviĝo, sed ankaŭ al tio, ke granda nombro da ĝiaj partneroj elturniĝu el defecito per siaj teknikoj kaj instalaĵoj. Unu el ili estas la Xiangfan-a Fabriko de Ĉasioj.



Hanjiang-rivero

Antaŭe la fabriko estis traktor-fabriko kaj ĝiaj produktoj havis grandan merkaton, sed de la 80-aj jaroj ĝia totala produktovaloro malkreskis de 18 milionoj da juanoj al 5.6 milionoj da juanoj, kaj plie, ĝi salajris siajn laboristojn per kredito.

Por vivteni siajn 1 400 laboristojn la mezgranda entrepreno produktis malgrandajn farunmuellilojn kaj remorkojn, sed la grandaj instalaĵoj investitaj de la ŝtato restis dormantaj.

Ankaŭ la fabriko de ĉasioj kaptis la ŝancon. Ĝi venkis siajn konkurencantojn kaj posedis la teknikon produkti framojn de la aŭto "Nissan-dizelo" kaj subskribis la kontrakton pri produktado de framoj de la oktuna kamiono EQ153 por la Dongfeng-a Aŭta Kompanio.

Ne estas facile posedi teknikojn kun monda nivelo en la fino de la 80-aj jaroj per ĉinaj instalaĵoj kaj materialoj.

Veldado estis malfacila por la laboristoj de la fabriko. Laŭ bezono de teknologio ili projektis aŭtomatan veldomaŝinon. Post multfoja provado ili sukcesis atingi la teknikan normon de la aŭto "Nissan-dizelo". Ili sukcesis ankaŭ en anstataŭigo de importita neegalsekca karoserio per egalsekca, kio ne nur malmultigis laborprocedojn, sed ankaŭ ŝparigis multan monon. La kontraŭlaca testado pruvis, ke la produkto povas elteni 830 mil fojojn da skuoj, pli multe ol la normo de la aŭto "Nissan-dizelo" je 230 mil fojoj. Tio markis, ke ili sukcesis en posedo de la enkondukitaj teknikoj pri produktado de la aŭto "Nissan-dizelo".

Je la fino de 1992 la fabriko jam havis la kapablon produkti jare 10 mil bremsojn por la aŭto EQ153. Sed antaŭe ĝi ne bone funkciis nek havis produkton en difinita formo. Nun ĝi produktas grandkvante kaj fariĝis granda ĉasifabriko de Ĉinio. Ĝia jara komerca valoro kreskis 33.8-oble, kompare kun tiu en la pasinteco.

Nun la fabriko provproduktas tritunajn kaj ununajn leĝerajn aŭtojn. Per teknologio pri produktado de oktuna ĉasio ĝi sukcesis produkti ĉasiojn de pasaĝeraŭtoj, kiuj vendiĝas en la internacia merkato.

SENĈESE BATALI KONTRAŬ POLUCIADO

En la malsupra baseno de Hanjiang-rivero, 2.5 km for de Xiangfan estas la turisma insuleto Yuliangzhou, ĉirkaŭita de Hanjiang- kaj Tangbai-riveroj. Ĝi ĉarmas per la natura pejzaĝo kaj prosperaj verdaĵoj. Tie kuŝas plaĝo kun klara akvo kaj areo de ĉ. 10 mil kvadrataj metroj. Sur la insulo funkcias traktejo de malpura akvo, kiu allogas multajn vojaĝantojn. Ĉiutage ĝi traktas grandan kvanton da malpura akvo kaj per tio garantias la akvokvaliton de Yuliangzhou.

Xiangfan estas urbo riĉa je historiaj vidindaĵoj. Hanjiang-rivero trakuras ĝin kaj estas la ĉefa fonto de trinkakvo por la Xiangfan-anoj. La magistrato laboris multe por malpliigi medipoluciadon. Ekz., la entreprenoj, kiuj estigas polucion, devas esti fore de la urboparto; estas malpermesate enlasi malpuran akvon en la riveron; la industria malpura akvo devas esti koncentrite traktata; la fabrikoj kun bonaj kondiĉoj devas havi traktejon de malpura akvo kaj tiuj kun nebonaj kondiĉoj devas fari traktadon per mono pruntita de la Monda Banko, helpe de la magistrato; la malpura akvo de la urbo nepre devas enflui en la traktejojn. En la urbo estas ses tiaj traktejoj investitaj de la magistrato. Dank' al tio, la akvo en Hanjiang-rivero estas kun almenaŭ duaklasa normo de trinkakvo. La traktejo de malpura akvo de Yuliangzhou estas unu el ili.

Por malpliigi fulgopoluciadon en la aero la hejtado en la urbo estas farata koncentrite, kaj samtempe, oni plenergie forstumus, ke en Xiangfan la medio pli kaj pli boniĝas. ■

EKONOMIO

● Estis lanĉita la elektrizita fervojo inter Baoji de Shaanxi-provinco kaj Zhongwei de la Ningxia-a Huj-nacia Aŭtonoma Regiono. La fervojo longas 498.19 km, kunligante la provincojn Shaanxi, Gansu kaj la regionon Ningxia. La fervojo servas kiel grava trapasejo inter nordokcidenta Ĉinio kaj la aliaj lokoj de Ĉinio kaj estos grava parto de la dua Eŭrazia Ponto inter la havenurbo Lianyungang de Ĉinio kaj Roterdamo de Nederlando.

● Ĉinio sukcesis elfari magnetflosan pasaĝeran trajnon, kies rapido de teoria projekto superas 500 km ĉiuhore. Nun en la mondo la aliaj sukcesintoj estas Germanio, Japanio, Britio, eks-Sovetunio kaj Koreio.

● Lastatempe en Pekino aperis unu post alia moderprezaj vendejoj ŝatataj de pekianoj. La dekorado de tiaj vendejoj estas neluksa kaj iuj el ili estas tenejo-memservejoj. La prezoj estas malpli altaj ol tiuj de alispecaj vendejoj je 8-20%. Direktoro de iu tia vendejo diris, ke la vendejoj estas plenaj de klientoj, ke la relativa profito ŝajne estas malpli alta, sed la absoluta profito altiĝis pro malmultaj investo kaj elspezo por administrado.

● Utiligante la lokajn superecojn, la kamparanoj de la gubernio Wuxi de Jiangsu-provinco plivastigis la skalon de agrikultura kaj flankokupa produktado. Estas pli ol 20 specoj de eksportaj varoj, kiaj ekzemple fridigita lepora viando, fridigita anaso, konkulo, Taihu-aj arĝenta fiŝo kaj korbikulo. La kvanto de eksportitaj arĝentaj fiŝoj estas 100 tunoj. La gubernio aplikis novan metodon de krabobredado en rizkampoj kaj ĉiujare eksportas 100 tunojn da kraboj.

● Lastatempe estis tegmentita en Shenzhen de Guangdong-provinco, Ĉinio, 81-etaĝa domo de la komerca centro Diwang. La domo altas 383.95 metrojn, la tria en la mondo kaj la unua en Azio. La unua, 110-etaĝa kaj 443-metra, en Ĉikago, kaj la dua, 110-etaĝa kaj 417-metra, en Novjorko.

Por la konstruado oni aplikis la teknikon de betona kerna muro, kio malgrandigis la volumon de ŝtalaj fosto kaj intensigis la fortikecon, kaj krome sur la konstruejo oni ne aŭdis tranĉan bruadon de maŝinoj nek vidis polvo-nubulon.




Sceno el la televid-filma serio "Tradiciaj Popolaj Muzikoj kaj Dancoj de la Ĉinaj Nacimalplimulto"

KULTURO

● La Ĉina Nacimalplimulta Aŭdio-vida Eldonejo kaj la Japana Korporacio JVC kune faris grandan serion de televidaj filmoj "Tradiciaj Popolaj Muzikoj kaj Dancoj de la Ĉinaj Nacimalplimulto" kaj distribuis ĝin al la tuta mondo.

Prof. lo Chou esploranta specimenojn de papilioj





Granda drakoboato skulptita de Tong Xiaohai

La filmoserio fidele registris la tradiciajn popolajn muzikojn kaj dancojn de la 55 ĉinaj nacimalplimultoj prezentantaj la mondokrean miton, nupton, novjaran kultadon, religian liturgion kaj ankaŭ ludadon de naciaj muzikiloj. La filmoj prezentas la kolorriĉajn vestojn, naturan medion, popolajn loĝejojn, religiojn, pikturon kaj manĝaĵojn.

- Profesoro Io Chou, fama ĉina esperantisto kaj entomologia sistematikisto de papilioj, prezidis la redaktadon de "Monografio de Ĉinaj Papilioj". La verko el miliono da ĉinaj ideogramoj detale priskribas la esploradon, biologian karakteron, klasifikon kaj dispozicion de papilioj, inkl. de pli ol 1 800 specioj da papilioj de Ĉinio. La libro enhavas 5 000 delikatajn kolorajn bildojn. Ĝi estas la plej impona lepidoptera verko, tre valora por scienca esplorado.

- Tong Xiaohai estas lerta en skulptado de drakoboato. En sep jaroj li skulptis pli ol 300 drakoboatojn en diversaj formoj. Sur la boatoj estas etaĝaj turoj, kioskoj kaj belvidejoj. La plej granda el liaj boatoj longas 3.40 metrojn. Sur tiu boato estas ses-etaĝa turo kun aĵuraj pordoj kaj fenestroj ĉiuj moveblaj. Tiu boato estas konservata kiel ŝtata majstraĵo en Zhejiang-halo en la Popola Halo en Pekino, titolita per la nomo de lia hejmloko Zhejiang-provinco.

SOCIO

- La Ŝtata Statistika Buŝo de Ĉinio raportis, ke ĝis la fino de 1994 vivas en Ĉinio 116.97 milionoj da homoj pli-ol-60-jaraj, kiuj konsistigas 9.76 procentojn de la totala loĝantaro de Ĉinio.

En tiu homgrupo malaltaj estas la procentoj de fraŭl(in)oj kaj eksedz(in)oj. Dank' al la stabileco de


interrilatoj en la familioj de la ĉinoj, plejparto de la maljunuloj vivas kune kun siaj gefiloj, kiuj povas bone prizorgi ilin. Nur 7 procentoj de tiu homgrupo vivas solaj.

ARKEOLOGIO

- En la ruino de Shang-dinastio (16-11-a jc. a.K.) en la okcidenta antaŭurbo de Anyang de Henan-provinco oni senĉese havis novajn trovojn en arkeologia prifosado ekde 1928.

En la lastaj jaroj arkeologoj de Anyang elfosis 1 583 pecojn da bestaj skapoloj kaj testudaj ŝeloj, ĉiu kun dekoj aŭ centoj da ideogramoj. La delikataj hieroglifoj ĉefe notis kultadon, ĉasadon, veteron, malsanon k.a. Tio estis la tria grava trovo de post 1936.

La envaza ulmo, plej granda en la mondo



Masaĝo en la ĉiutaga vivo (VII)

KONTRAŬ PERIARTRITO

Periartrito atakas ĉefe ĉirkaŭ 50-jarajn homojn. Pro la malsano ĝenerale doloras unu ŝultro. Ni prenu kiel ekzemplon masaĝon de la dekstra ŝultro de la malsanulo. Sidu la masaĝato kaj vi masaĝanto staru malantaŭ li.

(1) Rulu vian pugnon sur la ŝultro kaj doloranta dorso ĝis varmigo.

(2) Per manradiko knedu la muskolojn de la dorso kaj ŝultro 1-2 minutojn.

(3) Per la dika aŭ montra fingro prem-knedu la akupunkturajn punktojn *ĝjanŭajŝu*, *ĝjanĝing*, *tjanzong*, *ĝjanju*, *ĝjanĝen*, *binaŭ*, *ĉjuepen*, *ĉjuĉi*, *ĉjuze*, *nejĝuan*, *ŭajĝuan* kaj *hegu* kaj la komencan parton de la brakaj bicepsoj (Bildo 1).

(4) Tenu la supran parton de la ŝultro per unu mano kaj la pojnon per la alia. Turnu la brakon de la malsanulo livume kaj dekstrume po 3-5 fojojn. Turnu ĝin en tia amplekso, kian la malsanulo povas elteni. La ŝultro malpermesas grandampleksan movadon, tial vi ne devas turni ĝin tre forte. La masaĝo estas utila por fortikigi la tendenojn, vigligi sangcirkuladon kaj malstreĉi la artikan koheremon.

(5) Per viaj manoj tenu la pojnon de la malsanulo kaj supren tiru ĝin malrapide kaj malforte.

(6) Movu la ŝultran artikon laŭ jenaj manieroj:

A. Levi supren: Duonkaŭru antaŭ la malsanulo. La malsanulo metu sian manon sur la ŝultron de la masaĝanto. Kaptu la ŝultron de la malsanulo per la manoj, malrapide stariĝu kaj levu supren la brakon de la malsanulo.

B. Movi internen. La malsanulo metu sian manon tuj antaŭ la bruston kaj vi estu tuj apud li. Tenu la

ŝultron de la malsanulo per unu mano kaj lian kubuton per la alia. Tiru la kubuton internen.

C. Etendi malantaŭen. Staru flanke de la malsanulo. Per unu mano tenu lian ŝultron kaj per la alia kaptu lian pojnon. Tiru la brakon malantaŭen kaj fleksu lian kubuton. Ĉe la fleksado movu lian manon supren laŭ la spino.

Ĉ. Etendi eksteren. Staru malantaŭ la malsanulo. Per unu mano premu lian ŝultron kaj per la alia tenu lian kubuton. Tiru ĝin eksteren.

Vi devas fari la supre menciitajn movojn stabile kaj ne tro forte.

(7) Per via mano kaptu la ŝultron kaj la dolorantan brakon de la malsanulo kaj forlasu ilin. Faru tion 3-5 fojojn.

(8) Staru flanke de la malsanulo. Per viaj manplatoj tenajle tenu la ŝultron de la malsanulo kaj rapide frotu ĝin, unu mano supren kaj la alia inverse. Faru tion 3-5 fojojn (Bildo 2).


KONTRAŬ FASCIITO DE DORSA MUSKOLO

Fasciito de dorsa muskolo, ĝenerale dirite, estas kronika lezo de dorsaj muskoloj, tendenoj, membranoj kaj aliaj molaj histoj.

La malsanulo kuŝu surventre kaj vi masaĝanto staru malantaŭ ties kapo.

(1) Rektigu viajn fingrojn. Metu viajn manplatojn sur la dorson de la malsanulo kaj per ili frotu kontinue la dorson supren kaj malsupren, aŭ dekstren kaj maldekstren. La froton komencu de la meza linio de la dorso kaj dum la frotado iom post iom movu viajn manplatojn ambaŭflanken de ĝi, por ke la tuta dorso estu varmigita.

(2) Staru flanke de la malsanulo kaj rulu viajn pugnoj sur la dorso



1. Ĉjuepen 2. Komencu parto de la braka bicepso 3. Ĉjuze 4. Nejĝuan 5. Ĝjanŭajŝu 6. Ĝjanĝing 7. Ĝjanju 8. Binaŭ 9. Ĉjuĉi 10. Ŭajĝuan 11. Hegu 12. Ĝjanĝen 13. Tjanzong 14. Daĝu 15. Ĝjanŭajŝu 16. Ĝjanĝing 17. Tjanzong 18. Ŝinŝu 19. Ganŝu 20. Geŝu 21. Fejŝu

de la malsanulo tien kaj reen, 3-5 fojojn.

(3) Per viaj dikfingroj prem-knedu la akupunkturajn punktojn *daĝu*, *fejŝu*, *ŝinŝu*, *geŝu*, *ganŝu*, *ĝjanŭajŝu*, *ĝjanĝing* kaj *tjanzong* (Bildo 3).

(4) Per viaj dikfingroj pluku trifoje la muskolojn ambaŭflanke de la spino de supre malsupren kaj per la manradikoj rapide knedu tiujn muskolojn 3 fojojn.

(5) Prem-knedu kaj pluku la dolorantajn punktojn, rigidajn nodojn kaj kordoformajn striojn de la malsanulo.

(6) Metu viajn manplatojn unu sur la alian (Bildo 4) kaj per ili premu la spinon kaj la muskolojn ambaŭflanke de ĝi 2-3 fojojn. Premu ilin de supre malsupren, modere kaj ne tro forte.

(7) Staru malantaŭ la kapo de la malsanulo. Puŝu viajn manradikojn aŭ dikfingrojn sur la muskolojn ambaŭflanke de la spino de la malsanulo 3-5 fojojn.

(8) Per viaj manplatoj frotu la dorson de la malsanulo 3-5 fojojn, de supre malsupren. ■

PRI LA HISTORIO DE LA ĈINA CERAMIKO

de ZHAO MUYING

ĈINA CERAMIKO, verkita de Zhao Hongsheng, esperantigita de Wang Chongfang, eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo en 1994, formato: 12 × 18.4 cm., 260 pĝ., prezo: 6.00 USD.

La libro estas popularscienca legaĵo pri la evoluo de la ĉina ceramiko. Ĝi ne estas kroniko nek fikcio, sed rakontado de ceramika fakulo, kiu esploris la ĉinan ceramikon dum dekoj da jaroj kaj enkorpigis en sian rakontadon la amon al la ĉina ceramiko. Lia rakontado bazita sur la historiaj faktoj kaj la enmiksita komentario certe impresos vin per agrableco kaj intimeco, kaj vi povos ĉerpi el la rakontado sciojn pri la ĉina ceramiko.

Fajencaĵo estas la plej frua invento de la homaro. La prapatroj de la ĉina nacio estis la unuaj en la antaŭhistoria mondo, kiuj inventis kaj uzis fajencaĵon. Arkeologia esplorado konstatis, ke antaŭ dekmil jaroj Ĉinio ekuzis fajencaĵon, preskaŭ samtempe kun aliaj civilizitaj landoj. Kaj porcelano estis inventita en la antikva Ĉinio, 1 500 jarojn pli frue ol en Eŭropo. En la pasinteco multaj homoj en la mondo konis Ĉinion pere de porcelanaĵoj, tial iuj rigardas Ĉinion kiel la hejmlandon de porcelanaĵoj. Nun Ĉinio daŭre produktas kaj eksportas grandan kvanton da ceramika-

ĵoj, kaj ili estas multe ŝatataj tra la mondo.


ĈINA CERAMIKO vekis grandan intereson ĉe la ĉinaj kaj alilandaj esperantistoj. S-ro Li Zhiyan, ĉina specialisto pri ceramiko, la unua legis la verkon kaj skribis por ĝi antaŭparolon. S-ro Fu Zhenlun, veterana esperantisto kaj ceramika specialisto de la Muzeo de Ĉina Historio, multe laŭdis post legado, ke la riĉa enhavo, preciza terminaro, delikataj ilustraĵoj kaj fotoj de la libro konturas la ĉinan ceramikon.


Surbaze de historio, kulturo, arto, teknologio kaj scienca esplorado, la libro kombinas sin kun arkeologio, historiaj dokumentoj, produkta praktiko, fizika kaj kemia analizo, folkloro kaj mito. Por la legantoj interesigantaj pri la ĉina kulturo kaj ĉina ceramiko, ĝi servas kiel bona materialo por koni la historion de la ĉina ceramiko.

Invento de fajencaĵo strikte rilatis al la evoluo de la homaro kaj estis grava marko, ke la homaro ekhavis fiksan loĝejon post eniro en neolitikon. Sen fajencaĵo Ĉinio ne povus fariĝi antikva civilizita lando. La ĉapitro "Historiaj Atestoj pri la Ĉina Antikva Kulturo" montras, ke la antikvaj fajencaĵoj elokvente atestas la teknikon kaj ideologion de la homaro, spegulas

la konadon de la homaro pri estetiko, mekaniko, teknologio k.a. Ĉu la skriboj sur fajencaĵoj je 2 000 jaroj pli fruaj ol la hieroglifoj sur karapacoj kaj skapoloj, ĉu la primitiva mekanismo aŭ recepto, ĉu delikataj desegnoj sur fajencaĵoj, ĉio senescepte kongruas kun la evoluo de la civilizacio de la homaro kaj spegulas la bredadon kaj fermentigadon. En la libro vi legos pri la monda miraklo, la argilaj figuroj de militistoj kaj ĉevaloj elfositaj el la tombo de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio, pri la trezoraj trikolore glazuritaj argilaĵoj de Tang-dinastio. Invento de porcelano estas gravega kontribuo de Ĉinio al la scienco, tekniko kaj kulturo de la tuta mondo, kaj en la antikveco de Ĉinio prosperis porcelanaj bakujoj, kiuj ankoraŭ ĝuas renomon nun. La 13-a ĉapitro kongigas la famon de la ĉina ceramiko en la mondo, kaj la ĉapitro "La Prospera Familio de Ceramikaĵoj" prezentas la grandan kaj longtempan influon de la ceramika industrio sur la estontecon de la homaro.

La 15 ĉapitroj kun centmil ideogramoj estas ilustritaj per 45 bildoj. Kaj sur la lastaj paĝoj estas 16 fotoj de fajencaĵoj kaj porcelanaj majstraĵoj el diversaj dinastioj de Ĉinio. Tiuj fotoj faras la tekstojn pli legindaj. ■





Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto- Eldonejo

Rateto Volas Edziniĝi

Dum la longa historio la ĉina popolo kreis multe da delikataj kaj superbaj metiartaĵoj, kiuj estas ege ŝatataj de

ĉinoj kaj eksterlandanoj. Cirkulas ankaŭ sennombraj belaj legendoj pri ĉinaj metiartaĵoj. En tiu ĉi libreto ni kolektas dek unu legendojn pri la trikolora fajencaĵo de Tang-dinastio, la giganta budho en Leshan, la naciaj muzikiloj ĉevalkapa violono kaj *dombro*, la novjara bildo, argilmodlaĵo, vakstinkturaĵo, brodaĵo kaj aliaj.

Ĉi tiu libreto estas la 8-a el la serio de la ĉinaj popolarakontoj eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo.

Formato: 11 × 18 cm. 60 pĝ. kun 5 nigra-blankaj ilustraĵoj

Prezo: 4.00 USD

Mendu ĉe: Distribua Fako de EPĈ
Libroservo de UEA
nia peranto en via lando

GALERIO

Pentraĵo "Aŭskultado de Muzikoludo"


Teksto de WU BO

La pentraĵo estis farita sur silko en formato 51.3 cm x 147.2 cm. En la mezo de la pentraĵo staras bela pino kun prospera branĉaro, kaj la trunko estas ĉirkaŭvolvita de maljuna liano. Sub la arbo sidas muzikoludanto en flava ĉapo kaj nigra vesto. Li havas trankvilan mienon. Ambaŭflanke de li sidas aŭskultantoj en ŝtatoficistaj kostumo kaj ĉapo, kun mieno respektita kaj humila. Tio sugestas, ke la ludanto havas neordinaran rangon. En antikvaj ĉinaj poemoj oni ŝatis metafore kompari la sonon de kordmuzikiloj kun plaŭdado de pinoj en vento. En tiu ĉi pentraĵo la altega pino okupas la supran duonon. Per tio la aŭtoro sugestas, ke la muziko estas agrabla kiel plaŭdado de pinoj. Unu el la aŭskultantoj ĝuas la muzikon kun levita kapo, alia kun straĉitaj oreloj kaj tria kun klinita kapo: ĉiuj en absorbiteco. Fumkoloneto ŝvebas el incensujo, kio pli akcentas la ĉarman medion. La situoj de la personoj estas simetriaj, kaj facile videblas la kortega rango-diferenco. la pentraĵo estas distingiĝa de la samtemaj verkoj.

Gia aŭtoro estas Zhao Ji (1082-1135), imperiestro de la Norda Song-dinastio. Li estis tre kapabla en kaligrafio kaj pentrado de floroj kaj birdoj. Dekstre en la pentraĵo estas la titolo "Aŭskultado de Muzikoludo" skribita de la aŭtoro, kaj sube maldekstre estas lia sigelo "Homo la Unua sub la Ĉielo". Meze supre es-

Nova libro eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo

Internacia Vortaro de Mikroba Genetiko



Internacia Vortaro de Mikroba Genetiko (Esperanta-angla-ĉina) estas verkita de s-ro Ralph A. Lewin, prof. de biologio en Kalifornia Universitato, kaj elesperantigita de s-ro Xu Senrong. La vortaro entenas pli ol 700 terminojn. Krom terminoj specifaj en mikroba genetiko kaj molekula biologio, la vortaro entenas ankaŭ la plej ofte uzatajn terminojn de la ordinara genetiko (de eŭkariotaj plantoj kaj bestoj) kaj biokemio. Ĝi aperis en Esperanto, angla kaj ĉina


lingvoj.

Formato: 13 × 18.50 cm. 128 pĝ.

Prezo: 12.00 USD

Mendu ĉe: Distribua Fako de EPĈ
Libroservo de UEA
nia peranto en via lando

tas poemo skribita de la tiama ĉefministro Cai Jing. Dank' al la freŝaj koloroj kaj delikata desegnado, la mienoj de la personoj estas fidele montritaj. La pentraĵo reprezentas la stilon de Zhao Ji kaj estas rara senmorta verko plemunita de ĉina imperiestro.





一九四一年八月十日第三次长沙會戰身歷心山悲感者仍予前次之結果
徐悲鴻

Galopo (Cinstila pentraĵo farita en 1941)

de XU BEIHONG

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九五年第十期
(本刊代号:二—九一五) 国内统一刊号:CN11 1339/G2

